

# La palaco

japaneska fantazio  
de

Carl Jonas Love  
Almqvist

tradukita de

Gunnar Gällmo

La svedlingva originalo de ĉi tiu teksto aperis en 1838, kaj ĝia aŭtoro mortis en 1866.

Esperanta traduko © Gunnar Gällmo 2008

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe  
<http://www.lulu.com>

antaŭe aperis en esperanto de la sama verkisto:

**Tio konvenas** (Al-fab-et-o 1998, tradukis Sten Johansson)

**Ormuzdo kaj Arimano** (Lulu 2007, tradukis Gunnar Gällmo)

## **Enhavo**

La verkisto kaj la verko — antaŭparolo de la tradukinto 5

La palaco 9



## **La verkisto kaj la verko — antaŭparolo de la tradukinto**

Laŭ la normoj de la literatura romantikismo, ne necesis koni fremdan medion por uzi ĝin beletre. Do la "Japanio" kiu estas fono de ĉi tiu libro ne nepre donas korektan priskribon de la tiutempa vere ekzistanta Japanio (des malpli pri la nuna, kompreneble); kaj la "japanan" lingvon plurfoje cititan en la teksto certe neniu japano komprenas.

Pri tiuj aferoj Almqvist cetere ne povis scii multon, ĉar kiam li verkis ĉi tiun tekston, Japanio estis femita lando. Tre malmultaj eksterlandanoj estis permesitaj eniri la landon, sub tre striktaj kondiĉoj, kaj neniu japana civitano rajtis forlasi ĝin.

Kaj ĝuste tiu fakto estas la bazo de la rakonto, pri japana komercisto kiu, spite al la malpermeso, ja translokiĝis al Anglio, sed kiam venas el lia hejmo letero de lia mastro kun ordono — kiom li pretas ribeladi?

Cetere, oni notu bone ke la rakontanto de la libro ne estas Almqvist mem, sed lia fikcia figuro Richard Furumo (rakontanto ankaŭ de la antaŭa Lulu-eldonaĵo *Ormuzdo kaj Arimano*). Do ne estas facile scii, je kioma grado la antaŭjuĝoj kiujn li esprimas, ekzemple pri la rilato inter azia kaj eŭropa kulturoj, estis fakte tiuj de la verkisto

— eble kelkaj, sed certe ne ĉiuj.

Carl Jonas Love Almqvist estis unu el la plej gravaj svedaj verkistoj de la 19-a jarcento, filozofia kaj politika pensanto kiu laŭ mia opinio devus esti interesa ankaŭ por alilandanoj. Li estis komplika persono — romantikisto kaj realisto, burokrato kaj poeto, moralfilozofo kaj almenaŭ foje piulo, sed tute ne sanktulo.

Li naskiĝis la 28-an de novembro 1793, studis ĉe la universitato de Upsalo kaj laboris kiel oficisto en Stokholmo. Dum la jaroj 1824-1825 li provis, laŭ kelkaj tiutempaj romantikismaj ideoj, vivteni sin kiel kamparano en la provinco Vermlando. Kompreneble li trovis ke, kvankam kamparanoj ne ĝuis grandan respekton, tamen ilia profesio postulas certajn kvalifikojn kiujn li tute ne havis. Li do denove translokiĝis al Stokholmo, kiel li en 1828 iĝis instruisto ĉe la lernejo Nya elementarskolan; dum la jaroj 1829-1841 li estis ĝia lernejestro. En 1837 li pastrigis en la tiama ŝtata — kaj monopola — luterana eklezio, kvankam lia religia konvinko ne tute, aŭ eĉ tute ne, koincidis kun ĝiaj dogmoj. Kiel ĵurnalisto li kunlaboris en du el la tiutempe plej radikalaj svedaj taggazetoj — Aftonbladet kaj Jönköpingsbladet.

Pro ekonomiaj problemoj li konfliktis kun la uzuristo von Scheven, kaj eble provis murdi lin

per arseniko. Lia kulpo tamen neniam estis jure pruvita (kaj multaj el liaj admirantoj ĝis hodiaŭ kredas ke li estis senkulpa, tamen ne ĉiuj), ĉar en 1851 li tre rapide forlasis la landon kaj elmigris al Usono.

Al Svedio li neniam kuraĝis reveni, riskante tie mortopunon pro murdoprovo. Li tamen revenis al Eŭropo post 14 jaroj en Ameriko, petis sed ne ricevis garantion pri sia sekureco en Svedio, kaj mortis pro naturaj kialoj en Bremeno, Germanio, la 26-an de septembro 1866, apenaŭ 73-jara.

Kiel verkisto li estis komence romantikisto kaj poste realisto. En esperanto aperis en 1998, ĉe la eldonejo Al-fab-et-o, lia realisma romaneto *Tio konvenas* ("Det går an"), en traduko de Sten Johansson. Ĝia svedlingva originalo aperis en 1839, hazarde la saman jaron kiel la originalo de *Ormuzdo kaj Arimano* ("Ormus och Ariman"), kiun mi jam publikigis per Lulu, sed oni kredas ke tiu estis verkita jam pli frue, pro la malsameco inter la stiloj de la du verkoj. *La palaco* aperis unu jaron pli frue, en 1838, kaj plene esprimas la romantikisman aspekton de la verkisto, sed samtempe lian kritikemon al blinda obeado.

La ĉefa beletraĵo de Almqvist estas la granda ciklo *Törnrosens bok* ("Libro de sovaĝa rozo"), kiu aperis en du serioj 1833-1851 (do ĝis lia fuĝo

al Usono). Ĝi konsistas en kadra rakonto kaj granda nombro da enŝovitaj longaj kaj mallongaj rakontoj (inkluzive ĉi tiun), poemoj, teatraĵoj, eseoj, traktaĵoj kaj eĉ muzikaĵoj; Almqvist komponis ne nur la melodiojn al sia propra poemciklo *Songes* ("Songoj"; la titolo estas franca, sed la poemoj svedlingvaj), sed ankaŭ kelkajn porinstrumentajn muzikpecojn, nomitajn *Fria fantasier för pianoforte* ("Liberaj fantazioj por fortepiano"), 1847-1848.

Almqvist verkis ankaŭ faklibrojn pri lingvistiko kaj matematiko, ekzemple svedajn gramatikon kaj ortografion (la literumado de la sveda lingvo unuafoje normiĝis maljam dum lia vivtempo).

Kiel politika pensanto, Almqvist estus unu el la plej maldekstremaj svedaj verkistoj de tiu tempo. Kelkaj el liaj pensoj estis tre radikalaj por liaj samtempuloj, poste estis akceptataj sed nun ŝajnas denove eksmodiĝi, ekzemple tiu ke krimulo estas esence malsanulo, ne puninda sed kuracinda (tiel en lia eseo de 1821 *Om brottsliges behandling*, "Pri la traktado de krimuloj").



## La palaco

Estis bela, kvankam malvarma vespero. La parencaro de sinjoro Hugo kolektiĝis en unu el la malplej grandaj ĉambroj de la Ĉaskastelo, kie la unua fajro de la aŭtuno gaje salutis ilin. Vaksandeloj brulis jam en la angulkandelabroj, kaj ĉiuj aŭskultantoj eksidis proksime unu al la aliaj atendente la rakonton de la vespero. Sed kiam Richard, anstataŭ ekrakonti, haltis ĉe la fortepiano de sinjoro Hugo, kaj tie tuŝis kelkajn klavojn, vekis atenton la fakto ke la melodio ŝajnas eksterlanda, ja tiel eksterlanda ke ĝi eĉ ne sonas eŭropeca. "Pri kio temas?" ekkriis sinjoro Hugo. "Mi scias ke vi estis eksterlande, Richard, eble malproksime, kaj pli malproksime ol ni supozis?"

Mi memorigis al mi la komencon de melodio, li respondis. El ĉiuj aventuroj, kiujn mi spertis, mi ne konas iun, kiu donis al mi tiel apartan impreson, kiel tiu kiun mi travivis iam en granda angla urbo ĉemara.

"Venu ĉi tien — venu ĉi tien — sidiĝu apud ni, kaj ni aŭdos vin eĉ pli bone. Angla urbo ĉemara? ang—"

Richard proksimiĝis. Mi ofte, li diris, ĉirkaŭiradis sur unu el la plej belaj promenlokoj de tiu urbo, riĉa kaj ĉarma pro la multoblaj vicoj

de altstaturaj arboj. Ĉiuj aĝoj kolektiĝis tie. La junularo montris sin en la brilo de tio, kiun la modo prezentis plej ĵuse kaj bele. Multaj amindaj personoj de ambaŭ seksoj vidis unu la alian ĉi tie la unuan fojon, kaj nodis pli ol unu ligan. Fonto, ekipita per akvoj kaj varmaj kaj fridaj, ĉio ordigita kaj aranĝita por ĝui matene, estis boniga ne nur por la sano, sed ankaŭ por la distraĵoj de la tuta tago; kaj eleganta *hôtel d'Asie*, je unu limo de la longaj padoj inter foliarboj, ricevis same fremdulojn kaj vojaĝantojn el ĉiuj ĉirkaŭantaj lokoj, kiel la loĝantojn de la urbo mem, kiam tiuj, post mil gajaj rondiroj sub la ombroj de la arboj, deziris ĝuigan ripozon en la restoracio.

Tiu urbo havis tiel vastan komercadon kun la havenoj de Azio, Ameriko, Afriko kaj Eŭropo, ke oni povus opinii ke ĝi apartenas al la tuta tero pli ĝuste ol nur al Anglio.

Apud la padoj en la menciita promenloko staris seĝoj kaj sofoj el mahagono, kie la plej belaj grupoj de piedirantoj ofte kolektiĝis starante antaŭ aliaj grupoj, kiuj sidis. La plenecon de vivo kaj graco en la moviĝantaj bildoj ne malofte intensigis la ekvido de iu almozulo aŭ almuzulino, kiu en grizaj aŭ nigrabrunaj ĉifonoj same kontrastis al la cetero, kiel kiam oni vidas bone adaptitajn ombraĵojn de inko aŭ tuĉo en la profundo de la foliaj faldoj de

bele desegnitaj kaj artece akvokolorigitaj floroj.

Mi notis, ke tiuj almozuloj preskaŭ ĉiam ricevis ion. Ankaŭ almozdonado estas unu el la ĝuoj de la riĉulo. Kion li malhavigas al si mem, tio estas tre malmulte kompare al la ĝojo de la koro, kiu ekkreskas pro la eta ago malavara; kaj la ripetita atentigo pri lia feliĉa stato kompare al tiu de la mizerulo, kiu staras kurbigita antaŭ li, bone valoras kelkajn pencojn ĉiufoje.

Tiu urbo certe enhavas multajn bonajn homojn, ĉar mi vidis neniun almozpeti kun postulema impertinento, kaj neniun doni kun rigida frido. La malriĉulo estis afabla en sia humileco, kaj la riĉulo afabla en la esprimo de sia kompatato. Tiu reciproka bonvolo pli valoris ol la donacoj; ĝi kunigis la du apartajn klasojn.

Dum mi profundigis en longa vojo, kie neniuj alia ĝuste tiam iris, mi vidis sur unu el la flankaj benkoj virinon sidi en senmova trankvilo. Ŝi havis altan aĝon kaj lanvestaĵojn malfajnajn, striajn, ĉifonitajn; kaj ŝia pala, kruda vizaĝo kompletigis la bildon de malbela mizero. Vekis mian atenton la fakto ke ŝi sidis, ĉar gealmozuloj ja kutime iradas. Eble ŝi estas elĉerpita hodiaŭ? Aŭ ĉu ŝi kalkulas sian etan enspezon ĉivesperan? Pasante mi proksimiĝis al ŝi, por vidi ĉu ŝi eble apartenis al la nombro de tiuj, kiujn oni nomas "modestaj malriĉuloj", kaj kiuj en pli alta socia

klaso estas nomataj *pauvres honteuses*. Ĉar tiuj certgrade portas duoblan ŝarĝon, ĉiam estis aparta plezuro mia veni proksime al ili, por vidi la profunde elokventajn, la el la okulkavoj saltantajn kaj pri almozo preskaŭ kriantajn rigardojn, dum la lango rifuzas eĉ plej modeste servi, kaj pri la mano estas spasma lukto inter la bezono etendi sin, kaj la honto kiu devigas ĝin nepre ne moviĝi. Tiu kruela batalkampo, kie la kruda surtera mizero luktas kontraŭ altnivela kaj sentema spirito, estas vivplena, kaj estas interese vidi ĝin. Malrapide kaj neatendite proksimiĝi al tia persono, kaj per donaco, kiun tiu neniam petis, je kies nura mencio ŝi ekstremus, apogi la spiriton en ĝia severa batalo, doni al la ĝojo iom da aero en preskaŭ senaera brusto; tio ja plaĉas. Mi ne volonte preterpasas tiajn distraĵojn, kaj ankaŭ nun mi intencis kapti la okazon. Sed kiam mi jam havis la oran moneron inter miaj fingroj, kaj venis tute proksime al la sidanta virino, mi ne kuraĝis etendi mian manon. Ŝi tiel evidente rigardis la preterpasanton, min, tute indiferece; jes, por diri la veron, ŝi tute ne rigardis min, sed turnis sian kapon al apud la benko staranta alta, folioplena arbo, malantaŭ kiu ŝi direktis siajn rigardojn malproksimen laŭ alia vojo, kvazaŭ ŝi atendis iun venontulon sur ĝi.

Ho? mi silente pensis, mi do ne rajtas? Fakte

estis mi, kiu tiam almozpetis, kaj estis rifuzata. Kiam mi tiel antaŭiris, mi ne povis tamen ne foje retrorigardi. Mi baldaŭ vidis viran figuron, maljunan, malbone vestitan, palan kaj magrigitan, ŝanceliĝante veni al la benko, kie la virino sidis. Mi haltis malantaŭ arbo por observi iliajn movojn. Kun gestoj, tiel vivaj kaj ĝojaj kiel la malforto permesis, ŝi ricevis sian venintan akompananton. Kiam ili renkontiĝis, mi vidis la viron fingromontri malrapide, sed tre precize, la finon de la vojo, laŭ kiu li venis; sed kiam mi mem rigardis en la saman direkton, mi ekvidis nenion, krom unu el la malantaŭaj pordoj de *hôtel d'Asie*.

La du nun komencis iradi kune. Mi ŝtele sekvis ilin je ioma distanco. Ili ne reiris tiun vojon, laŭ kiu la viro venis, sed tute alidirekten. Ambaŭ lamis, sed ili tenis unu la alian sub la brako kaj fidele apogis sin reciproke. Ĉar iliaj vizaĝoj ofte interproksimiĝis dum ilia irado, mi supozis, ke ili vigle konversaciis. Post momento ili atingis la finon de la aleo, kie larĝa strato, por veturiloj, krucis ĝin. Prijuĝu mian surprizon kiam, samtempe kun la sono de la oka horo el horloĝo en proksima turo, venis granda, kovrita, tre pompa ĉaro post du ĉevaloj; la kaleŝisto haltis vidalvide de nia aleo; lakeo en brila livreo eliris kaj malfermis la pordon, ĝentile mallevis la

ŝtupareton, kaj per sia mano apogis du el la ĉaro elirantajn personojn — ambaŭ ĉifonitajn, kaj kies vizagoj esprimis maltrankvilon kaj timon.

Kaj ne nur tio. Post la eliro de ambaŭ venis la aliaj du, kies spurojn mi sekvis; la lakeo etendis al ili la manon same ĝentile, kiel al la antaŭaj, kaj helpis ilin enĉariĝi. Neniu el la du paroj salutis la alian, ili ŝajnis esti unu al la alia tute nekonata; sed ĉiu el ili trovis tute en ordo, ke du eliris kaj du eniris. La ĉarpordo estis fermita post la enirintoj, la lakeo reprenis sian lokon malantaŭe, kaj mi trovis lin tie baldaŭ kune kun du aliaj lakeoj, eĉ pli brile ekipitaj. La kaleŝisto faris per vipo, en kies tenilo brilis enmetita perlamoto kaj kies ŝnuro aspektis farita el interplektitaj silko kaj ledo, eminentan kurbon en la klara, vespera aero; agrabla knalo audiĝis, kaj la ĉaro foriris.

Mi staris tie. Mi tiel enmergiĝis en pensado pri la granda kaj pompo de la ĉaro, ke la du elirintoj intertempe eskapis en flankan vojon, kaj ilin, kiuj sendube estus donontaj al mi la plej bonajn informojn, mi poste ne plu povis trovi. Ankaŭ nun en mia rakonto mi ne tiom longe pritraktus tiujn almozulojn akceptitajn en la ĉaro, se ne por montri kiel ili, kaj precipe la unua virino, iom post iom, kvankam nesciante, enkondukis min en ĉi tiun aventuron, kaj ligis min al la ĉaro kiun mi ĵus menciis. Nun — jam

scivolema kaj instigita — mi intencis mem sekvi la ĉaron por ekscii pli pri ĝi; sed vane, ĝi iris tro rapide.

Ĉar mi havis sufiĉe da tempo, mi denove eniris sub la arbojn, lasis miajn piedojn mem elekti kien iri, ĝuis la freŝecon de la bela vespero, estis preterpasita de centoj kun la sama sinteno kiel mi, kaj finfine decidis tamen por la vesperio decidati. Ĝuste kiam mi pensis pri tio, la horloĝo anoncis la naŭan kaj duonon; kaj apenaŭ aŭdiĝis la sonoj de la horloĝo, kiam altstatura preteriranto diris al unu el siaj akompanantoj: "Aŭdu, nun la horloĝo anoncas la naŭan kaj duonon!"

Tiu sensignifa vero ne devintus kapti mian atenton. Sed ĉar mi tiuvespere ne havis mian kutiman akompanantaron, ja iris sola, min impresis ĉio, kaj mi nun decidis — ĉar tamen estis la naŭa kaj duono — iri vespermanĝi. Mi supreniris la ŝtuparon al *hôtel d'Asie*, kaj trairis kelkajn salonojn, kiuj ne plaĉis al mi, ĉar iliaj tabloj estis plene okupataj de malsataj, babilantaj, bruantaj, malbele parolantaj homoj el ĉiuj sociaj klasoj kaj dialektoj.

Mi baldaŭ eniris en unu el la malgrandaj ĉambroj, ekipitaj per la plej altkvalita meblaro, kaj tabloj en la fenestraj niĉoj. Mi intencis sidiĝi tie, kiam mi ekvidis la gravuraĵojn de la ĉambro.

Unu el ili kaptis mian atenton; ĝi tute aspektis kiel afiŝo — tamen ne farita per lignogravuro — sed fajna kiel ŝtalgravuro. Sed ĝiaj aspekto kaj impreso estis tute afiŝecaj — kaj — kion? mi ekkriis — en ĝia centro videblis ekzakte tiu ĉaro, kun ĉevaloj, kaleŝisto kaj lakeoj, la de mi rimarkita pordornamo, la per kolorigita vitro brilantaj fenestroj — ĉio — kio antaŭnelonge en tiu aleo estis la objekto de mia scivolemo.

Ankaŭ sube legeblis io, sed en kiu lingvo? Du linioj de por mi nekonataj literoj verŝajne donis pli detalajn informojn. Sinjoro kelnero! Kion signifas ĉi tio? mi diris al unu el la servantoj de la hotelo, kiu iris tra la ĉambro. Li nur levis la ŝultron, tamen plej ĝentile, kaj lian nigran frakon ĉe la levita ŝultro rapide sed forte lumigis surmura lampeto.

Sinjoro, mi volas manĝi ĉi tie, mi poste diris. — *Me voilà.* — Mi nun menciis unu el miaj preferataj pladoj, kaj iu je ioma distanco laboranta servisto, aŭ kelnero, estis ordonigita tuj prizorgi tion. "Kiu estas la lingvo sur tiu ĉi afiŝo, sinjoro Gaspard?" mi tamen daŭre diris. "Ja por iu celo ĝi pendas ĉi tie, ĉu ne?" Ioma rideto kaj kaposkueto, kune kun mallaŭte dirita: Ne demandu pri tio! estis lia tuta respondo.

Li eliris al ĉambroj, kie lia agado urĝis. Eta kaj afabla junulo eniris kun la kaviaro kaj



ceteraĵo de mi pripetita. Aŭdu, amiketo, kion signifas tiu eksterlanda afiŝo? mi demandis lin.

Ho? li vigle diris.

Jes, ĝuste tiu. Ĉu vi povas legi la suban tekston? Ĉu ĝi estas rusa, turka, aŭ — *if you please* — ĉina?

Ne — japana.

Ha ha ha! Mi komprenis, ke li kompensis unu ŝerceton per alia. Sed serioze, amiko mia, kion signifas la vortoj? mi kontinuus.

Tion mi ne scias, kaj neniu povas tion diri, li respondis; sed la enhavo estas la sama, kiel estas anoncote en nia lingvo, ĉe unu el la malantaŭaj pordoj, por sciigi la malaltajn klasojn.

Kion do la tutaĵo volas diri?

Tion, sinjoro, vi povas ekscii de tiu, kiu liveras la biletojn.

La biletojn? Kie li do estas?

En tiu ĉambro, dekstre.

Bonvolu akompani min do tien! — Ni iris. Mi trovis tie afablan biletvendiston, kiu ja verŝajne estis kelnero ankaŭ li, same kiel la alia, sed kiu akceptis tiun kromokupon. Kiom kostas viaj biletoj? Kaj kiun informon vi povas doni pri la afiŝo, pri kiu ili temas?

Kiom la biletoj kostas? Ne, sinjoro, male. La ĉaro, kiun vi vidas ĉi tie apude, faras certajn vojaĝojn tra la urbo ĉiuvespere. Kaj ĉiu persono,

kiu *volas* veturi en ĝi, estas por tio pagata per unu gineo, se li solene ĵuras malkaŝi al neniuj estaĵoj kion li dum la veturo spertis. Jen mi lasas la bileton, kiu estas enirkarto al la veturo. Elirinte la ĉaron, post finita vojaĝo, la pasaĝero ricevas la gineon, kiu estas lia pago.

Kien oni do iras?

Tion mi ne scias.

Sed oni verŝajne ne venas tien, kien oni volas?

Probable ne, ĉar oni estas por tio kompensata.

Ĉu rajtas ĉiu?

Ĉiu. Ĝis nun ja plejparte malriĉuloj profitis, ĉar tiu gajno ŝajnis al ili facila. Tamen —

Nu, kiu tamen?

Nu — sed pri tio oni ne parolu.

Kial ne? Por mi estas sufiĉe grave scii.

Por vi, sinjoro? Se mi rajtas demandi —

Ĉar mi deziras al mi bileton.

La junulo rigardis min per grandaj okuloj, kaj mezuris min de kapo al piedoj. Verŝajne ŝajnis al li ke mi ne bezonas gineon je ajna kondiĉo.

Nu — ĉu mi nun ne ekscios almenaŭ ion? Doni al mi bileton. Kiam okazos la venonta veturo?

Morgaŭ vespere; kaj jen la bileto, sed —

Sed?

Nu — konfidence dirite — malriĉulo povas bezoni sian gineon, kaj devas por tio toleri malagrabraĵon.

Ĉu temas pri io malhonoriga?

Mi ne povas diri; tion mi almenaŭ ne kredas. Sed — jes — eble du, tri, kvar aŭ kvin tuj poste devis estis metitaj en malsanulejo; kaj ni mem devas disdonadi la biletojn sufiĉe sekrete, por ke la polico de la urbo ne baldaŭ enmiksiĝu. Se oni per ĝi ne brile enspezus, tiam —

Donu al mi mian biletan: kostu kiom ajn, mi iros. — Li donis ĝin al mi silente.

Mi nun reiris, vespermanĝis; pagis; iris hejmen; tradormis la nokton; ellitiĝis matene, kaj dum la tuta sekvanta tago distris mian malpaciencon je mia kapablo.

Venis la dua vespero; la horloĝo anoncis la okan, kaj mi staris preta ĉe la konata aleo, kun tranĉis la veturvojo. La ĉaro venis, la lakeo eliris; mi montris al li mian biletan; li per la kapo konsentis, sed iris al la pordo por unue malŝlosi ĝin, kaj helpi eliri tiun kiu veturis ĉi tien.

Kiam la pordo estis malfermita montris sin altstatura kaj aĝa persono, kiu svenante falis en la brakojn de la lakeo. Sen zorgi pri tio, tiu ektenis la falanton, donis al li lian gineon, portis lin iom for de la ĉaro, kaj sidigis lin sur mahagonan benkon starantan en la aleo, kie li sen pliaj

ceremonioj lasis la malfeliĉulon sola. Poste li mansignis al mi ke mi eniru. Mi konfesas ke tio ŝajnis al mi dubinda ago. Kiu prizorgos la malsanulon tie? mi demandis la lakeon. Sen respondi, li nur faris al mi signon eniri. Mi faris tion. La pordo fermiĝis malantaŭ mi. La ĉaro ekveturis.

La veturilo enhavis grandan spacon; mi sidis tute komforte. Sed mi ne povis ne rimarki plurajn objektojn. Eta vitra lampo en unu angulo lumigis la internon de la granda ĉaro, kaj la aroma oleo disvastigis same agrablan odoron kiel lumon. Mi sidis sola sur mia flava marokenkuseno, kaj silka kurteno de planko al plafono dividis la ĉaron en du partojn, do mi ne povis vidi la alian pordon, aŭ la tutan duonon de la kupeo malan al tiu, kiun mi eniris. Ĉu mi havas iun najbaron maldekstre, malantaŭ la kurteno, mi do ne povis scii; sed ĉar la ĉaro havis kvar seĝojn, mi ankaŭ antaŭ mi havis lokon, kie kamarado povintus veturi dorsantaŭe vidalvide al mi, se ni ĉifoje estintus du. La menciita kurteno estis tiel densa, ke mi ne povis vidi ion ajn tra ĝi, kaj ĝiaj randoj estis tiel proksimaj al la plafono, flankoj kaj planko, ke ne eblis por mi ion ekvideti. Kompreneble mi sidis silenta, kaj la kaleŝisto veturis glate; la stratoj estis bonaj, la skuado nesignifa.

Tiu plezuro iom post iom iĝis teda. Mi prenis

mian horloĝon, kaj vidis ke baldaŭ estos por mi tempo eliri. Mi tamen esperis veni al iu domopordo, esti enigita, propraokule vidi ion — aŭ, Dio sciu. Sed veturi — tutnure veturadi — kaj poste tutsimple eliri?

La flava tafto de la kurteno, kiu direktis la lampolumon en miajn okulojn, vigligis mian scivolemon; tion mi ne povis helpi. Ke malantaŭe troveblu nenio, krom la alia duono de la ĉaro, tute malplena, tion mi ne trovis kredinde. Tie — tie ene estas io.

Mi jam etendis la fingrojn por tuŝi la tafton, kiam mi rimarkis ombron malantaŭ ĝi, sufiĉe klara por esti videbla tra ĝi, kaj proksimiĝanta al la kurteno, proporcie al la proksimiĝo de miaj fingroj. Similis al tio kion oni vidas en spegulo, kvankam mi ne povis kompreni kiamaniere tio okazis. Nek ŝajnis al mi, ke tiu mallumaĵo, kiu proporcie proksimiĝis al miaj proksimiĝantaj fingroj, tuttute portretis ilin, aŭ aspektis same kiel ili, kiel ĝi devus, se ĉi tie temus pri spegulo. Mi nun vekis kuraĝon en mi, kaj per la mano prenis iom de la tafto, por pertuŝe kompreni kiel ĉio estis interligita. Tuj miajn fingrojn ekprenis pinĉilo, kaj fiksiĝis tiel forte, ke mi vane provis liberigi ilin. Mi ne povas priskribi mian doloron. Estis io — por tiel diri — humiliga, kaj tiel des pli iritiga, esti tiamaniere fiksita. La fingroj ja ne

estis pinĉitaj tiel forte, ke la turmento iĝis vera torturo, sed ĉar mi ne povis malfiksi ilin, mia tuta korpo estis devigata stari oblikve, kio estis pozicio ege malkomforta. Mi helpis min per mia alia mano; sed kiam tiu ektuŝis la tafton, ĝi tuj fiksiĝis same. Pro honto mi ne volis krii; sed en mia senespero, mi volis senligiĝi per la piedoj; fulmrapide estis ĉirkaŭ ili ŝnurkaptiloj.

Malvarma ŝvito glitis suben laŭ la harrando. Feliĉe, la ĉaro nun haltis, kaj la lakeo malfermis la pordon kun eminenta ĝentileco. Kiam li tuŝis miajn manojn kaj piedojn, malaperis ĉiuj ligiloj, kaj mi eliris, ja ne sveninta, kiel mia lasta antaŭulo, sed ema preni la lakeon, metafore dirite, en la harojn, kaj devigi lin akompani min ien, kie li kompensu min kaj la tutan mondon por tia nekomparebla traktado.

Tiu penso tamen baldaŭ forflugis, kiam mi vidis ĉirkaŭ mi ĉiujn piedirejojn senhomaj, kaj trovis ke mia kontraŭulo, krom la kaleŝiston, havis du amikojn je la malantaŭa flanko de la ĉaro alvokeblajn. Mi tial nur grincigis la dentojn sekrete, sed la gineo, kiun li kun ekstrema ĝentileco nun volis doni al mi kiel kompenson por la veturo, tujtuje falis en la apudvojan kanaleton, pro elasta frapo, kiun la fleksebla mano de la lakeo ricevis de mia. Tio neniel ĝenis lin; kun la indiferenteco kaj malvarmo de

perfekta kortegano li ree foriris, restaris en sia loko, kaj la ĉaro forveturis.

Tiu aventuro ŝajnis al mi la plej malnecesa, kiun homoj en la mondo ĝis nun inventis. Sed dum mi plej cerbumadis, al kio povas servi ĉio tio — tiu veturo — tiu ĉaro — tiu tre ruze elpensita, preskaŭ nekompreneble farita meĥanismo — kaj fine la tuta kosto; tiam mi ekpensis, ke mi mem estas la kaŭzo de la mizera fino. Kial mi estis scivolema? Se mi ne tuŝus la tafton, tiam — kiu scias — io alia ja fine okazus?

Novan bileton mi devis akiri, tio estis mia decido. Dirite, farite. Venis la posta vespero. Feliĉe miaj manoj ne estis tiel grave damaĝitaj, ke mi devis serĉi ĥirurgon. Mi staris kun mia bileto ĉe la ĉarpordo. Nun la lakeo certe surpriziĝos, vidante min la duan fojon, mi pensis. Sed tute ne: surprizo ŝajnis al tiu homo pura neeblaĵo. Mi eniris.

Ke mi ene retiris min oni komprenu. La kurteno kaj la tuta ĉaro aspektis simile. Mi decidis, je ĉiu kosto, ne tuŝi la danĝeran tafton. La veturo iris bonege; mi sidis sur kuseno, plenigita de cigna laguno, tion mi kredis min senti.

Mia indiferenteco kaj kapablo mildigi ĉiun deziron pri malkovroj daŭris. Por pasigi la tempon, mi prenis mian horloĝon; la tempo pasis

malrapide kaj monotone. Sed la lampo brulis klare kaj disvastigis la plej agrablan aromon. Kompreneble mi permesis al mi rigardii la tafton, kaj mi vidus rekte tra ĝi, se ne la kurteno neatendite kaj rapidege leviĝus. Apud mi, maldekstre en la ĉaro, sidas sinjorino en flava, silka ŝtofo. Mi ne malmulte miris.

Ŝi sidis en la alia, maldekstra ĉarangulo, apogante sin tiel, ke ŝi duone turnis sin al mi, kaj ŝiaj okuloj estis direktitaj rekte al mi. Cetere ŝi nek levis nek mallevis ilin. Ŝiaj lipoj ne moviĝis, ŝiaj vangoj estis tre rondaj, tamen ne malagrabla, kaj ilia haŭto pli olivverda, ol blanka. Ŝiaj haroj estis aranĝitaj en maniero malpli kutima, sed ja bela. Ŝi seninterrompe rigardis rekte al sia objekto, mi, per tre grandaj, nigraj kaj humidaj okuloj.

Mi plurfoje intencis malfermi mian buŝon por demandi ion, sed mia kapo turniĝis je la penso, kaj mia buŝo meĥanike fermiĝis. Esti seninterrompe, eĉ se nur dum dudek minutoj, la objekto de traboranta, senhalta rigardado el nekonata okulparo kiu, influita de neniuj emocioj, ne leviĝas, ne malleviĝas, eĉ ne palpebrumas — se oni iam spertis tion, tiam oni scias kion signifas "timige". En la ĉiama rigardado de mia najbarino ja estis neniuj malamo same kiel neniuj bonvolo, neniuj frosto same kiel neniuj varmeko;



fakte ne aspektis kiel danĝero, sed estis fikseco, kiu povis tute malbalanci sian objekton. Mi komencis kredeti, ke mi je mia flanko havis ne vivantan estaĵon, sed pentritan, plej artece faritan statuon. Sed apenaŭ vekigis tiu penso ene de mi, kiam ŝi levis unu manon al siaj haroj, kvazaŭ por pli bone lokigi buklon ĉe sia tempio. Per la alia ŝi aranĝis kelkajn faldojn de sia longa, ĝispieda robo. Tiuj movoj tamen ne malhelpis ŝin sidi kaj rigardadi, kiel antaŭe. Unu fojon malfermiĝis ŝia buŝo — sed nur malmulte; nur tiom, kiom postulis ŝia spirado, kaj videbletis la plej ekstera rando de delikate blankaj dentoj, eksterordinare malgrandaj, sed ebenaj.

Mi faris ĉion por eviti ŝiajn rigardojn. Mi ne estas nervoza, sed estis skuita ĝis la bazo de mia esto. Mi provis teni unu manon antaŭ miaj okuloj, kiel kiam oni defendas sin kontraŭ la lumo de suno aŭ fajro; sed malgraŭ tio la konvinko, ke ŝi tamen rigardas min, preskaŭ frenezigi min. Mi fikse rigardis la ĉarplankon, mi turnis mian kapon, kaj lasis miajn harojn esti la objekto de ŝia atento; sed tio ne helpis. La sento ĉiukaze esti tia celo trairis min kiel febra tremado; kaj fine ŝajnis al mi, ke mia persono komencis fandiĝi.

En tiu terura momento mi ekpripensis ion, kiun mi ofte faris, nome defendi min kontraŭ danĝero per io el ĝia propra centro. Mi rapide

ekkuraĝis, levis la kapon, turnis min al mia kunvojaĝantino, kaj decidis mem rigardadi ŝin, se eble eĉ pli traborante kaj senhalte. Mi koncentris mian atenton ne al ŝia tuta vizaĝo, sed nur al ŝiaj okuloj; kaj, en ili, precipe al la pupiloj. Mi apenaŭ estis komencinta tiun aŭdacan entreprenon, kiam sento de forto kaj firmo trafluis min. Mi vidis rekte en tiujn klarajn, sed karbonigrajn okulglobojn — tute same kiel ili rigardadis min. Eble estis la kuraĝo, brilanta en ili, kiu elektris min per samspeca kuraĝo. Mi ne scias kiom mi volus esprimi, se ŝi per la plej eta vorto rompus la silenton kaj ŝanĝus la scenon.

Tamen mi nun malkovris ŝanĝon, kiu periode komencis montri sin, kaj reveni. La al mi direktitaj okuloj foje pligrandiĝis: la pupiloj tiam etendiĝis tiam, la okulgloboj estis kvazaŭ forlasontaj la kapon, la iriso pliheliĝis, kaj ŝajnis kvazaŭ neesprimebla timo volas serĉi elirvojon, por, se eble, tiamaniere sciigi min pri si. Foje, male, la okuloj tiris sin enen, iris pli profunden en siajn rondajn ĉambrojn, la aspekti tiam iĝis tia, kia ĝi estas kiam oni per sia tuta kapablo akriĝas la vidforton; kaj la pupiloj montriĝis esti sufiĉe malgrandaj, sed briletantaj kiel grenatoj, aŭ pli bone dirite, kiel malhelaj ametistoj, ĉar en tiuj momentoj ili iĝis iom violkoloraj. Tiu alternado inter egiĝo kaj etiĝo ne okazis rapide, sed ĉiufoje

sufiĉe konstante; kaj en la lasta formo, la cetere en si mem bela rigardo iĝis neeltenebla. Estis, kvazaŭ mian vizaĝon pikus la pinto de nuda rapiro. Fine — dum unu el tiuj ŝanĝoj — la buŝo de la nekonatulino komencis iom pli ol antaŭe malfermiĝi; mi povis vidi la ekstremon de la plej fajna lango. Se ŝi volus malŝpari al ni unusolan vorton! mi pensis.

Sed vana estis mia deziro. Dum unu el la transiroj, ŝia vizaĝo esprimis tian fortostreĉon, kune kun surprizo, kiam ŝi malfermis kaj apenaŭ videble movis la lipojn, ke la sekvanta penso iĝis klara al mi: ŝi volas paroli — ŝi havas grandan, ne esprimeblan bezonon de helpo, bezonon paroli por komprenigi sin, sed ŝi ne povas aŭ ne kuraĝas!

Rapide kaj senpripense mi tuj kriis: Je la nomo de la ĉielo, kion mi kredu? Kiu vi estas? Kion vi volas? Ĉu mi povas helpi —

Mia lasta vorto mortis — ĉar la kurteno jam falis inter ni, kaj la lampo en la ĉarangulo estingiĝis kun la sama pura sono, kiel kristala bovlo en frotharmoniko disrompigax. Ne plu brulante, la oleo disvastigis sian parfumon multoble. Agrabla, kiel ĝi unue estis, ĝi iĝis por mi tro forta kiam ĝi rapide kreskis. Mi devis enspiri tiun venenon, miaj okuloj fermiĝis, kaj mi falis senkonsciencia al la ĉarplanko. Iujn

torturilojn mi tamen ne sentis.

Mi vekigis ĉar la ĉaro haltis. La lakeo malfermis la pordon, levis kaj elportis la svenintan vojaĝanton; iris; kaj la ĉaro for. Sidante sur ĝardena benko mi baldaŭ rekonscienciĝis, kaj enpulgigis la freŝan, vesperan aeron kun nepriskribebla ĝojo. Gineo falis el mia mano. Kion? mi diris al mi mem, ĉi tie kaj tiel, ĉi tiu aventuro ne povas finiĝi. Ja ree mia scivolemo detruis la okazantaĵon, kaj donis al mi eron de io kiu, se tuta, eble kostus al mi sufiĉe.

Kial demandi kaj demandi? mi kriis al mi mem, amare. La demandoj interrompis kaj detruis ĉion! Mi ekstaris, kaj decidis preni ankoraŭ unu bileton.

La sekvanta vespero venis, kaj mi staris kun mia nova bileto antaŭ la haltanta ĉaro. Feliĉe mi ankaŭ ĉifoje montriĝis esti la sola pasaĝero. Mi estis akceptata kaj denove sidis ene.

La kurteno nun estis nigra. Neniun alian ŝanĝon mi rimarkis. Sed certe neniu alia estaĵo estis same silenta, kiel mi tiam. Finiĝis la unua akto: la kurteno leviĝis, verŝajne ĉar mi ne degnis tuŝi ĝin. Mi rigardis maldekstren; blanke vestita virino sidis tie.

Ĉu ŝi estas la sama? mi diris al mi silente. Mi rekonis la saman vizaĝon, sed la okuloj ne plu

direktiĝis al mi. Ŝi ĉirkaŭrigardadis plurdirekten, veturis kiel oni veturas, kaj ne restis rigide sidanta en la ĉarangulo kiel mumio en sia niĉo. Sed tiu leĝereco, tiu libereco kaj neatendita malfermeco ĵus preskaŭ logis min fari la demandon tiel naturan en ĉiu kunestado inter nekonatuloj: kun kiu mi havas la honoron — Fulmrapide mi tamen ekmemoris mian decidon ne demandi ion ajn, kaj mi silentis. Ŝi diskrete ridetis, ĵetante rapidan rigardon al miaj lipoj.

Ĉu ŝi do povas legi kio okazas en mia interno? Mi singarde ne elparolis tiun demandon. Mi permesis al mi rigardi ŝiajn eminente ĉarmajn piedojn.

*"Acamapixi menetekel uvarsinto?"*

Per tiuj nekonataj vortoj, dirataj de klara voĉo, rompiĝis la silento inter ni. Mi levis la rigardon. Sinjoro Hugo, ĉu vi povas diri kiu lingvo estis? Mi ne povas, nek volas promesi ke mi absolute korekte citas la sonojn post tiel longa tempo. Tamen mi ne neas mian surprizon, kiam mi aŭdis, ke la lastaj vortoj estis proksimume la samaj, pri kiuj la Malnova Testamento mencias, ke ili dum diboĉa festeno en la kortego de la reĝo Belŝacar estis skribitaj sur lia muro de nekonata fingo. Ĉu ŝi estas babilona? mi pensis; sed tio ne eblas, nuntempe ne ekzistas iu Babelo. *"Mene tekel Ufarsin?"* mi ripetis laŭvoĉe, kaj faris al ŝi

demandantan kapsignon.

Ŝajnas ke mia najbarino interpretis tion kiel respondon; ĉar per impeta, sed same bela voĉo ŝi tuj supersŭtis min per la sekvantaj vortoj: "*Cama cama uvarsintoj, menetékeli derepintoj — Cama tocàma yonk!*"

Nun mi ne plu trovis vortojn.

"*Acamapixi?*"

Ne — de mi neniu respondo.

"*Ongria Hirvendrù — yonki', yonké, yonkelà.*"

Li viklecon de ŝiaj gestoj dum tiuj vortoj mi ne povas pentri. En ili videblis neniu provo persvadi aŭ kortuŝi min, nenio kion oni povus nomi plaĉemo, eĉ se oni plejeble streĉus la signifon de tiu vorto, sed tamen fortega deziro pri io. Mi estis firme decidinta nenion demandi, pri nenio miri, kaj ne esti scivolema. Enpense mi trafolumis mian geografion, por el la lingvaj sonoj en la nomoj de konataj regnoj, provincoj kaj urboj povi elcerbumi, el kie mia gastigantino en la ĉaro povus esti. Rusio? Turkio? Afriko? Ameriko? — ne, nenie. Por tamen ne esti sen ĉiu kunestemo, mi decidis mem kuraĝi elparoli kelkajn sonojn, kaj ekkriis: *Miracorma grancas!*

Je tiuj naivaj silaboj, kiujn mi tutsimple inventis surloke, kaj kiuj sendube ne enhavis la plej etan racion, mia najbarino ekmontris mienon

de ekstrema ĝojo kaj admiro, kvankam ne eblis ke mia diraĵo signifas ion en ŝia lingvo, pli ol en iu alia en la mondo. Ŝi levis la manojn, kaj rigardis min kiel liberanton. *Yorotímo Tékelin!* si ekkriis, prenis malgrandan, en la antaŭo de la ĉaro pendantan sonorilŝnureton, kaj mi aŭdis la klaran sonon de tintilo, fiksita al la kaleŝista seĝo. Sendube signalo, mi pensis. Fidela al mia decido demandi pri nenio, mi dume sidis tute silenta. La ĉaro haltis, mi rigardis eksteren tra la fenestro kaj ekvidis kradopordegon. Kion vi diras nun, sinjoro Hugo, kiam, post ĉiu stranga eksterlandaĵo, kiun mi ĵus aŭdis, mia najbarino tute neatendite diris en akĉentita sed klare komprenebla angla lingvo: Ni haltas nun, ni ĉi tie iras dise, demandu ĉion kion vi volas, ĉar nun mi estas preta respondi.

Mi estis jam pretiginta miajn lipojn por fari mian demandon, kiam mia bona naturinstinkto ekhelpis min. Ne — neniu scivolemesprimo! mi ripetis enpense; ŝia invito certe estas nur nova testo; kaj la plej forloga el ĉiuj, ĉar ĝi ŝajnas tiel natura kaj simpla. Sed kelkaj sonoj sen signifo ne interpreteblas kiel demando; do por montri mian ĝentilecon, mi iomete riverencis al ŝi kie ni sidis, kaj respondis: *Gramasch, garamascho!*

Ha! ha! ha! Bonege! ŝi ekkriis. Vi estas la ĝusta. Venu!

La ĉarpordo malfermiĝis. La lakeo mallevis la piedbreton. La unuan fojon mi nun rimarkis, ke tiu persono, kiu antaŭe ŝajnis al mi tiel apatia pri ĉio, nun estis pala kaj siavice tremis, kiam li donis al mi la manon por helpi min eliri. Mi elsaltis senhelpe kaj leĝere kiel plumo. La pordego estis malfermata, kaj mi jam eniris la pordejon, kiam mi turnis min por vidi mian akompanantinon. Ankaŭ ŝi nun estis ekster la ĉaro, kaj staris ne malproksime de mi. Sed kiam mi ofertis al ŝi mian brakon, pensante ke ŝi plue akompanos min en tiun domon, tiam ŝi kun eta adiaŭa kapsigno enŝteliĝis en malgrandan flankan pordon, kaj lasis min sola — des pli, ĉar la kradopordego tuj fermiĝis kaj disigis min de strato, kaleŝisto, lakeoj, kaj de ĉio vivanta, kiu restis ekstere.

Nu, mi ja povas iri memstare en tiuj larĝaj kaj bonege faritaj ŝtonaj ŝtuparoj. Kaj tiel mi faris. Mi iris supren, kaj pli supren. Kiam mi venis tra mian ŝtuparojn, kiel ŝajnis al mi, tutan rondon, mi deziris ke ĉio estu finita, kaj provis trovi iun pordon. Tute ne. Mi vole-nevole devis pli supreniri. Do en turo mi iradas?

Tiel estu. Mi ne komprenis kiel mi povas esti tiel ĝoja. Finfine tamen ne estis pli da ŝtupoj, kaj, post certe cent paŝoj, mi staris antaŭ pordo. Super ĝi estis pli-malpli la samaj strekoj kaj hokoj, tio



estas literoj, kiujn mi vidis skribitaj sub tiu afiŝo. Tre bone, mi pensis, kaj turnis la ŝlosilon. La pordo malfermiĝis, kaj al mi venis milda vaporo, simila al tiu kiun mi flaris el la lampo en la ĉaro. Mi trovis vestiblon, iris rekte tra ĝi, poste eniris alian vestiblon, kaj trairis ankaŭ ĝin. Sed pli interne komenciĝis denove ŝtuparoj, kaj ŝtuparoj, kiuj iris suben certe same longe kiel la antaŭaj iris supren. Mi povis fari al mi bonan bildon pri la grandeco de tiu palaco. Certe mi atingis ĝian centron.

Nun mi fine staris en ĉambro, simila al nenio de mi antaŭe vidita. La muroj estis faritaj el blanka marmoro, intermitante kun spegula vitro de plafono al planko, enkadrigitaj per la plej distingindaj lignospecoj, kiel kupreso, lentisko kaj lariko, tre bonaj pro sia rezineca aŭ pli ĝuste dirite kaŭĉukeca naturo. En la kupolforma plafono pendis grandega kandelabro, konsistanta el kelkmil kristalaj lampetoj, similaj al tiuj kiujn mi vidis en la ĉaro. Kian lumon tiu verŝis super la tutaj ĉambro, muroj kaj planko, tion oni povas kompreni. Sed el kio do estis farita la planko? Gardu vin, piedo mia! Estas akvo! Imagu se mi estus farinta eĉ nur unu paŝon el la pordo, tra kiu mi eniris, tiam mi sendube falus — mi ne scias kiel profunde.

Sed kiam mi turnis min kaj rigardis, kaj

pripensis, mi verŝajne nur estas en gigante granda kaj riĉege ornamita banĉambro. La akvo, kiu kovris la tutan plankon, do ne povis esti tro profunda. Mi ĉirkaŭiris la randojn promenante; ne malofte mi rigardis la spegulojn.

Mi ne vidis homon en la tuta granda ĉambro, kaj la akvo kuŝis klara kiel ĉielo. La lumo de la kandelabro falis en ĝin kun pompo nepriskribebla. Apud la kuvego estis en la marmoraj muroj etaj niĉoj aŭ kavaĵoj, kun komfortaj seĝoj, verŝajne por la banantoj.

Sed — kio nun? — ĉu do sola mi ĉi tie tamen ne estas? mi subite ekpensis, kiam mi en unu el la plej malproksimaj murkavaĵoj rimarkis vestaĵojn. Samtempe mi notis ondetojn sur la akvosupraĵo: cirkla, kvankam apenaŭ videbla movo aperis en la kuvego. Ĉu subakva naĝanto, ĉar mi vidas nenion? Sed la vestaĵoj indikas virinon.

Kion? estis vorto ĵus laŭtege pasonta miajn lipojn, kiam mia interna ekmemoro "Ne faru demandojn" bridis ĝin. Io blanka naĝis en la brilantaj ondoj tie sub la kandelabro. Kiam ĝi proksimiĝis al la rando, kie mi staris, ĝi zorgeme plonĝis en la akvon, kaj pasis min, dum mi rimarkis nenion krom kvar-kvin sur la akvosupraĵo rapide aperantaj kaj same rapide malaperantaj cirkloj aŭ figur-indikoj. Kiam la supozata homo denove foriris de mi malafanken

kvin aŭ ses ulnojn, ŝi ree proksimiĝis al la surfaco, eble por enspiri. Io duonvideblis en la saltanta akvo: estis kelkaj tro larĝaj kaj longaj harbukloj, kiuj ne degnis resti subakve. Ĉu nun troveblis ĉe la plej malproksima flanko de la kuvego iu pordo, aŭ pli ĝuste dirite kanalo, tra kiu eblus iri el tiu giganta banujo en alian ĉambron? Tion mi ne scias; sed pli-malpli tie ĉesis ĉiu movo en la akvo. Nur — se mi ne eraris — leviĝis, kiam la figuro malaperis tiudirekten, eta kapo rapide el la ondo kaj vidis rekte al mi, kaj la rigardo esprimis la plej elokventan peton pri helpo kaj asisto. Poste la kapo denove, kun sia tuta hararo, plongis en la fora, brilanta, dolĉa akvo, kaj malaperis. Mi ne plu vidis ĝin. Sed mi staris tute senmova, komforta, kaj sen miro — tiom mi nun estis venkinta min mem.

Kiam la kuvego jam estis tiel perfekte silenta kaj senmova, ke neniu vivantaĵo povis plu esti en ĝi, mi komencis iom ĉirkaŭvagi por rigardi, kaj iris, sufiĉe pardoneble, al la postlasitaj vestaĵoj. Mi vidis sufiĉe klare virinan robon el ŝtofo tre bela, sed ordinara kaj ne elstara. Por vidi ĝian formon, kaj el ĝi povi, se eble, konkludi al kiu nacio la homoj ĉi tie apartenas, mi levis la robon, kiu kuŝis sur la ceteraĵojn. Sed — denove pardoneble — mi komprenis nenion pri ĉiuj ĝiaj faldoj, randoj kaj formoj. Pli amuzis min kiam mi

vidis, ke alia robo, el pli elasta ŝtofo kaj pli bonaj koloroj, kuŝis sube. Mi do levis ankaŭ ĝin. Hm? Denove robo, pli delikata ol la antaŭe, ĉisube. Kaj sub tiu eĉ pli subtila... kaj tiel plu. Tiu malgrava distraĵo komencis amuzi min nepriskribeble. Mi ne scias kiom da vestaĵoj mi trovis, ĉiam pli fajnaj, kaj samtempe pli modestvolumenaj, kvankam same grandajn kiel roboj. La lasta estis tiel ekstreme fajnfadena, ke mi povis preni la tutaĵon premitan en mia mano, kaj tamen, kiam mi nur blovis al ĝi, ĝi elvolviĝis, kaj iĝis larĝa, bela, granda vesto.

Vivanta, ĉarma figuro, envolvita en ĝi — estus io vidinda — sed ja ne gravas! — nun neniuj deziroj!

Stari ĉi tie pli longe, mi ne deziris; mi tial serĉis al mi eliron — ne sub la akvo tamen, kiel tiu, tra kiu ŝi malaperis — sed ie flanke de la kuvego. Mi ĉirkaŭiradis, kaj venis fine al pordo, je la mala flanko de la salono, ambaŭflanke ornamita per pilastroj, ne korintastilaj, tiom mi trovis; sed kiu stilo estis, tiun problemon mi lasas. Kvankam por mi de nekonata speco, la ornamo estis senfine bela. Mi prenis ŝlosilon, ĉirkaŭ kies tenilo estis volvita kordo aŭ ŝnuro ĉirkaŭŝpinita per arĝento, kiu de tie atingis la plafonon. Mi ne zorgis pri tiu ŝnuro, sed sentime malŝlosis la pordon. Ho ĉielo! La ŝnuro forglitis de la ŝlosilo

— kaj raĉ! kiel tondro malantaŭ mi, la tuta grandega kandelabro falis en la kuvegon; la mil lampoj, duone estingitaj, duone briletantaj, ĉirkaŭflosis en la akvo; ankaŭ multaj el ili, tamen, flugis al la muroj, fulmetante frapis la spegulojn, kaj ĉirkaŭsaltadis en pluraj obskuraj anguloj. Tiel teruran kaj samtempe grandiozan spektaklon mi ne povas memori ke mi iam ajn spertis. Verŝajne la ŝnuro, malfiksiĝinta de la ŝlosilo, kaŭzis tiun scenon, kiu transformis la tutan banĉambron en pireteknikaĵon nekompareblan.

Por ne eniri la kampon de ĉio, pri kio mi ĵuris al mi esti singarda, nome demandoj kaj miro, mi lasis la kandelabron, kaj malfermis la pordon, tra kiu mi venis al novaj ĉambroj. Mi fine eniris unun. Tie mi haltis abrupte kaj ne foriris de la loko. Mi aŭdis muzikon.

Muziko ĝenerale, sed aparte tiu, ne priskribeblas; ĝi ne apartenis al nia mondoparto, tiom mi trovis.

La tonojn mi aŭdis faritaj per instrumento, kaj ilin akompanis la lamentanta voĉo de homo. Mi proksimiĝis al la granda silka kurteno, sub la baldakeno, kiun mi perceptis plej fore en la ĉambro; mi volis vidi tiun, kiu kantis tie interne. Ĉu ŝi estas malfeliĉa? mi pensis. Sen scii kial, mi ligis la ideon pri la kapo, kiun mi laste vidis malaperi en la bano, kun la penso pri la persono,

kiu kantis ĉi tie. Je la fino, ŝia simpla muziko komencis iom pli simili al eŭropaj melodioj; kaj kelkajn memoretojn de tiuj lastaj tonoj mi ĉivespere kuraĝis sonigi per la instrumento de sinjoro Hugo, komenconte mian rakonton.

Mi ne ankoraŭ atingis la grandan silkan kurtenon, malantaŭ kiu sidis la nekonatulino, kiam alia persono envenis kaj prenis mian manon. En ŝi mi rekonis mian kunvojaĝantinon. Mi iĝis malĝoja ĉar ŝi malhelpis min. "Venu, Menetékeli!" ŝi diris, "sekvu min!"

Ŝi kondukis min el la muzikoĉambro, kie mi tiel volonte restus. Per ŝia larĝa, granda, iom oreca vesto mi ne povis konkludi ion ajn pri ŝia nacio; sed ŝajnis al mi ke eĉ princino ne povus, ie ajn sur la tero, montri sin pli grandioza.

Dum la kunirado mi tamen kuraĝis denove rigardi ŝian vizaĝon. Ĝi estis tre rondecata, pli ol mi vidis ĉe iu alia; sed tamen tre bonforma, kaj pli agrabla ol oni povus kredi. Sur ŝia haŭto ne estis io karnkolora — ne iu signo de ruĝiĝo — sed la plej elstarantaj partoj de la vangoj tamen estis pli malhele flavaj ol la cetero, kiu similis al la koloro de nematuraj citronoj. La brovoj, tre fajnharaj, longaj kaj mallarĝaj, aspektis kiel nigra streko super ĉiu okulo. Mirindan mienon la vizaĝo havis pro la fakto, ke la brovoj iris iom pli malsupren tuj apud la nazo, ol ĉe la tempioj, pro

kio la okulanguloj estis ne ortaj, sed obtuzaj. Kiel eblas ke vizaĝo de tia formo povas aspekti altira, aŭ eĉ nur bela? Kaj tamen —

Kiam ni estis kune trairintaj unu ĉambron aŭ du, ŝi haltis kun mi meze sur la planko en tria, kaj diris: *Yonkè Tacosima!* Por ne esti senresponda mi aldonis: *Garaminxi yap!* Mia akompanantino tiam donis al mi flankan rigardon, kiu denove spegulis akceptantan ridemon, kaj el la speco plej fleksema, sed tutkora. Mi ne povis kompreni kio plaĉis al ŝi en miaj silaboj, kiuj certe ne enhavis ion en ŝia lingvo, kvankam mi provis imiti ĝiajn sonojn. Sed ke tiu imitado amuzis ŝin, tion mi rimarkis. "*Tolaûn tolanni!* Li estas trovita, la ĝusta persono estas trovita!" ŝi eldiris, turnante sin al la angulo de la ĉambro, kie je ŝia veno granda, silka franĝo estis frapita flanken, kaj viro levis sin — ne sen malfacilaĵoj — el impona kusenego, aŭ longa plenigita sako envolvita en brokato, sur kiu li sidis kun la kruroj sub si. Nek seĝojn nek tablojn mi vidis en la tuta ĉambro.

Granda patro! diris mia akompanantino —

*Ongria Hirvendrù* —

Mia patro! Lasu nin dum dudekono de suno (iom pli ol unu horo) provi paroli la lingvon de ĉi tiu lando, por ke la fremdulo komprenu nin —

*Cama camósima* —

Ĉu ĉi tiu fremdulo estas riĉa aŭ mizera, mi ne

scias, ŝi kontinuas; sed li havas la tri arĝentajn virtojn, kiujn vi bezonas ĉe li: pri nenio demandi, pro nenio timi, kaj — plej grave — esti inventema.

La viro metis la dekstran manon sur la maldekstran ŝultron, venis al mi kaj rigardis min sufiĉe akre. Fine liaj okuloj komencis akviĝi, kaj grandan kortuŝon montris lia mieno. Li komencis alparoli min en la loka lingvo; sed tiom malsukcese, ke lia filino dum paŭzo farita de la maljunulo interrompis lin kaj diris al mi: Ho fremdulo! Komprenu, ke ni ne estas de ĉi tiu insulo. Nia insulo estas granda, ja la plej granda sur la surfaco de la tero, kies centro ĝi estas. Sed ĉi tiu insulo de fremduloj foras de ĝi per mil sunoj (per vojaĝo de du kaj duona jaroj). Ĉi tie sur via insulo ne estas forĝita taŭga ŝtalo, kaj ĉi tie ne vivas la silka vermo; tial nia patro vojaĝis ĉi tien trans la kvincent maroj kun sia riĉa vararo, por iĝi eĉ pli riĉa, kaj li vivis inter la nekonatuloj, kiel kutime faras neniu el nia popolo. *Loinxi ejvé! ejvó!* ŝi tuj post tio kriis, plej afliktite. Dum ni vivis en ĉi tiu urbo, aranĝante ĉi tiun nian domon laŭ nia moro kaj por nia uzo, mi kaj mia fratino samtempe lernis la mizeran lingvon en ĉi tiu insulo uzatan, ĝis ni ambaŭ bone komprenas kion diras aliaj, kaj ĝis mi povas diri al vi kion mi volas, ho fremdulo! Sed nia patro estas maljuna,



li povas kun granda profito vendi siajn bonegajn ŝtalarmilojn, sian lakon, siajn silkopakojn kaj diamantskatolojn; sed li ne degnis lerni vian lingvon, en kiu li povas malbone prononci nur kelkajn vortojn; nek mia fratino parolas ĝin, kvankan ŝi komprenas kion diras aliuloj.

*"Loinxi ejve! ejvó!"* nun mi miavice elkriis. Nenio povas pentri la miron aperantan en la vizaĝo de la maljunulo, kiam li aŭdis min elparoli tiujn vortojn en lia propra lingvo. Lia filino direktis al li longan replikon, verŝajne por pruvi al li, ke ankaŭ mia akcepto kaj ekuzo de ŝiaj propraj esprimoj estis ekzemplo de mia inventemo. Mi komencis trovi mian aventuron agrabla, ĉar estis ĉiam pli klare al mi, ke mi estis vokita por, se eble, fari ion por servi homojn. Demandi pri tio tamen ne decus. Al kio servus tiu tuta mistero, tion mi ne ankoraŭ povis kompreni. El kie fakte venis tiuj elforaj sovaĝuloj aŭ duonsovaĝuloj (mi parolas kiel eŭropano pri la popoloj de la aliaj mondopartoj), tion scii tre amuzus min. Meksikanoj, aŭ io alia el Ameriko, ili verŝajne ne povas esti, mi diris al mi, ĉar mi ĉe ili ne trovas spurojn de la forta ruĝo aŭ kuprokoloro en la haŭto, kiu laŭdire apartigas la naciojn de la okcidenta mondo. La patro — mallonga, larĝsultra, fortika figuro, ĉiurilate rondecata — pli ĝuste montris la malon de tiu

staturu, kiun oni atribuas al la sveltaj, flekseblaj viroj de Ameriko. Kaj vere li estis, laŭ tio kion mi aŭdis, riĉega homo, kio same ne kutimas ĉe amerikaj barbaroj. Tiuj ankaŭ ne kultivas silkon, ne forĝas ŝtalaĵojn, ne lakas, kaj ne komprenas meĥanikon tiel bonege, kiel mi spertis esti la kazo ĉi tie.

Tio tamen interesis min multe malpli, ol tio kiu sekvis. Tria persono envenis: ankaŭ virino, pri vizaĝo kaj vesto entute simila al mia akompanantino, sed pli eta, kaj pri ĉio eĉ pli fajna. Ŝia haŭto estis blindigante helflava, kaj same sen iu ajn ruĝo. Ŝiaj longaj okulharoj, mallargaj brovoj, kaj hararo aranĝita en multaj artecaj plektaĵoj ĉirkaŭ la frunto, ĉio estis korvnigra, sed en sia nigro brilis. Mi rekonis tiun kapon, kaj kiam ŝi parolis sian unuan vorton, mi ekmemoris la muzikon kiun mi aŭdis. Jen do la fratino? Mi rigardis ŝin, des pli senbare, ĉar ŝi rigardis ne min, sed sian patron.

Unu trajto ĉe tiuj homoj tre kontrastis kun la kutima eŭropa maniero. Profunda, sed por mi ankoraŭ nekonata, aflikto estis klare legebla kaj en la vizaĝo de la patro, kaj en tiuj de la filinoj. Sed malgraŭ tio okazis ke ŝerco, infana gajeco, aperis, foje per vortoj, foje per gestoj. Ŝajnis ke terura, baldaŭ okazonta katastrofo minace pendis super iliaj kapoj; sed ke tiu dum momentoj cedis

sian lokon al natura ĝojo kaj al la plezuro de la vivo. Tiaj transiroj karakterizas sovaĝulojn. Temas pri frivoleco, kvankam ne maldeca. La klera kaj edukita eŭropano plejofte estas ordema: se li havas kaŭzon ĉagreni, do li faras tion, kaj dume tute ne ridetas. Se li, aliflanke, estas ŝercema, tiam li ofte ŝercadas ĝisenuige. Kiu kapablas alterni? Fakte nur tiu, kiu nenion kapablas.

Fumanta teboligilo estis enportita. Ĝi aspektis farita el masiva oro, krom la fundo, tuj super la karboj. Unu el la princinoj, aŭ knabinoj, ĵetis cinamkoloran pulvoron super la karboj, per kio, anstataŭ la kutima europeca fetoro, bonaodoro, milda sed distinga, disvastiĝis tra la ĉambro. Oni ricevis sian teon; kaj ankaŭ mi — ne malgrandkvante. Ĝi fluis en granda bovlo de iu lakita materialo: la plato, sur kiu ĝi staris, kaj eĉ ĉe la flanko situanta kavigita figureto, kiun mi imagis esti kulero, kaj kiu kiel tia sufiĉe bone taŭgis, estis kovrita per brilanta, malmola ŝelako. Sed la teo mem — sen sukero kaj sen kremo — ĝi estis tia kiel ĝi povis. Tamen mi volonte gustumis ĝin, kaj, por diri la veron, kiam mi post momento profundiĝis en la bovlo, mi trovis, ke tiu trinkaĵo havis la efikon disvastigi tre agrablan senton ene de la trinkanto. Oni iĝis ĝoja sen ebrio kaj kapturino, kaj tio estis bona donaco. Kaj ĉe mia

deprimita gastiganto, la teo same efikis. La digno de lia larĝa vizaĝo bone restis, sed miksiĝis kun rideto, kiu ŝajnis signifi nenion malpli ol neesprimata filozofio pri la malgraveco de ĉi tiu tuta vivo. Subite li komencis, kvankam apenaŭ videble, luli sian kapon de maldekstre dekstren kaj poste reen, dum mi aŭdis lin per monotona, sed tre klara, voĉo kanti, aŭ pli ĝuste dirite por si mem reciti ĉi tiujn belajn vortojn: *Cariaconda, Sinto mi Sinto — à cama bè, à cama honda la Sinto schè* —

Mi ne komprenis ilin, sed sonis bele en miaj oreloj.

La du filinoj komencis same reciti. Ili sidis flankalflanke antaŭ la maljunulo kun la kruroj sub si, kiel li. Ankaŭ ili komencis malrapide luli siajn ĉarmajn kapojn, kaj kvazaŭ post interkonsento ambaŭ samdirekten, do la distanco inter iliaj harrandoj ĉiam estis la sama. Ili ne kantis plenvoĉe, sed ĉio similis al kontemplado, kiun ĉiu el ili faris por si mem, siamaniere komparebla al tio kiun ni nomas zumado; sed mirinde bela. Iliaj vizaĝoj dume anoncis altan piecon, sindonemon, enprofundiĝon en la ĉielan sferon; kaj fine brilis en iliaj okuloj klara flamo. Mi respektoplene tenis mian distancon. Ĉu povus esti religia rito? Ĉu himno? Tiu maniero recitadi similis al neniu eŭropa himnkantado, nek

popolkantado. Tute mankis en ĝi io pasiega, sovaĝa aŭ kruda, kiel rakontite pri la kantado de ne civilizitaj triboj. Tute male. Ĉi tie montris sin alta homa edukiteco, pureco, mildeco, nur pro sia manko de artefariteco iom monotona. Ĉu ĉi tiuj homoj apartenas al iu sekto, kie oni uzas neniujn dibildojn? Mi ĉirkaŭrigardis, kaj en la ĉambro ekvidis nenion tiel interpreteblan.

Ili finiĝis post iom da tempo. Tiam unu el la knabinoj levis sin, kaj iris al angulo de la ĉambro, vidalvide al la loko de iliaj kusenoj. Tie ŝi per unu mano levis tapiŝon, aŭ ŝalon, kiu kovris la plankon, kaj samtempe faris per la alia mano kelkajn signojn en la aero.

Kion mi vidis? En la planko mem, tie en la angulo, estis spegulego. La fratino kaj la maljunulo, ĉiu kun lampeto en la mano, iris tien, klinis sin, lumigis la lokon per siaj lampoj, kaj spegulis sin. Ion alian ol sin mem ili certe ne povis vidi tie sube. Mi do ripetas, ke ili spegulis sin; sed tio okazis tiel solene, serioze kaj profunde kortuŝige ke, de momento al momento, mia miro kreskis.

Se ankaŭ tiu sinspegulado, sinrigardado aŭ sinvidado estus religia rito, tiam almenaŭ mi neniam vidis iun similan, kaj mi dezirus, ke iu klerulo volus esplori, se en la historio de la popoloj troveblas spuroj de "spegulkulto" —

pardonu la nomon, mi ne havas pli bonan.

Certan efikon de tio mi kredis rimarki ĉe tiuj homoj. Ili levis sin post momento. Kvankam mi vidis ĉion defore, mi tamen perceptis la plej etajn ŝanĝojn en iliaj trajtoj. En ili nun lumis esprimo de belo, por mi neklarigebla, ĉar la trajtoj krom tio ne prezentis multon de tio. La maljunulo mem, kies eksteraj formoj certe ne estis belaj, per tia spegulado tiel vigliĝis, ke alta, sed silenta, entuziasmo brilis en ĉiuj liaj trajtoj. Verŝajne tio ŝajnas al multaj ridinda. Por ni, kutime, spegulado estas afero pure tualeta. Sed ankaŭ ĉe ni tion akompanas strangaĵo, kiun mi ne volas preterpasi, ĉar ĝi verŝas novan lumon super la homoj, pri kiuj mi ĉi tie parolas. Mi aŭdis kuraciston en Svedio serioze aserti, ke vidkapablon plifortigas vidado en spegulo, kiam la okuloj (originalo kaj kopio) fiksrigardas unu la alian. Tion oni povas facile provi; kaj pri tio estu kiel ajn, certe tamen estas, ke la tualetto, kiu por tiel multaj estas afero sensenca aŭ vanta, ne malhavas alian flankon pli bonan. La beligado, purigado, lavado, kombado, kaj mil tion akompantaj bagatelaĵoj estas — bagatelaĵoj. Se tio tamen okazas pro profunda deziro al la bonaspekta, bela, plaĉa, pure agrabla — sen tre granda intenco plaĉi al aliaj — sed tamen, mallonge dirite, por pli-malpli eniri iun kampon

de belo; tiam tio, kaj plej aparte ĝuste la spegulado, havas misteran efikon al la persono, kiu tiel agas. Se uzata por kultivi troan konscion pri onia aspekto, ĝi naskas koketadon; sed alikaze ĝi povas esti uzata kiel granda ilo por la purigo de la sento — jes, ĝuste purigo; tion mi rimarkis ĉe tiuj homoj.

Ke ne koketemo ravis miajn negekonatulojn dum ilia spegulado, tion mi trovis evidente. Tiel varman, tiel noblaniman, tiel grandiozan ĉarmon mi neniam antaŭe vidis en la vizaĝo de iu homo, kiel en la mieno de tiuj; kaj kiam al tio oni aldonas ĉion por mi novan ĉirkaŭ ili, tiam neniu miru, se mi observis ilin atente. Sed kio okazis?

La maljunulo iris kun tremantajpaŝoj al alia flanko de la ĉambro, kaj de tie li prenis grandan, falditan dokumenton, tute el silko (ĉar pri lino aŭ lano ŝajne tiu nacio nenion komprenis, almenaŭ mi nenion rimarkis pri tio). Li ekgenuis kun la frunto tuŝanta la plankon antaŭ la dokumento, kaj kun la plej dolorplena, plej penetranta krio de: *Loinxi kubo Kubésimo!* li malfaldis ĝin. Kio tie estis skribite, tion mi povis nek vidi, nek, se mi ĝin vidus, kompreni. Sed fine li kisis la plej suban randon, elkriis: *Dairi, dairanxi, tacòsama loinxi!* kaj subenfalis kiel sveninte.

Kion mi do pensus, kiam la du knabinoj, dum la patro ne vidis nin, venis al mi, ekgenuis al mi,

kaj kun la plej elokventaj mienoj ŝajnis alvoki min pri savo kaj helpo; sed samtempe indikis, ke mi ne per la plej eta vorto aŭ demando sciigu al ilia patro, ke ili petas min pri tio. Denove mi vidis antaŭ mi tiun bildon de la homo, kiam la lango nek kuraĝas nek volas esprimi la plej profundajn bezonojn de la estaĵo — kaj denove mi sentis, ke mi estas survoje al plezuro, kiu pli ol aliaj amuzis min — nome helpi, kie pri neniu helpo oni parolas.

Sed — se tio estu sekreto al ilia patro, kial en la nomo de Dio tamen ankaŭ li mem deziras mian ĉeeston? Ja ŝajnis ke li volas de mi havi helpon pri io; ĉu ankaŭ li? Sed la deziro de la filinoj devas esti io alia aŭ mala al tiu de la patro, ĉar ili indikas ke estas necese prisilenti ilian peton. Ja vere — certe mi kapablas ne demandi, sed inventemo necesas, por klarigi al si kio ĉi tie farendas.

La maljunulo, vekiĝinte el sia sveno aŭ apatio, leviĝis, serioza kaj rezignita. Li iris al sia granda silka kuseno, kie li kuŝis kiam mi unue venis. Li eltiris el sub ĝi longan, kurban, nudan glavon.

Li provis komuniki al mi sian intencon anglalingve, sed ŝanĝis sian decidon, kaj mansignis al sia pli aĝa filino, mia akompanantino en la ĉaro, anstataŭi lin pri tio. Ŝi



nun, nome de sia patro, interpretadis tiel: "Ho fremdulo, aŭdu! Post mia morto (tiu de la patro) kaj tiuj de miaj filinoj, baldaŭ okazontaj, tiam vi devos, sen sekigi ĉi tiun glavon, meti ĝin en la longan skatolon tie super ĉiuj rubenoj, kiujn vi trovos tie jam estantaj, ŝlosi la skatolon bone, involvi ĝin dudekfoje, per la ŝtofo tie en la sekreta ĉambro, poste kaŝe forigi ĝin el ĉi tiu domo, sen ebligi al la registaro de la urbo scii tion, porti ĝin al ŝipo kaj maroficiro, ne ankoraŭ veninta sur la rivero, sed venonta post monato, kaj kies adreson vi trovos en ĉi tiu sigelita, en la lingvo de via lando skribita letero. Mi bezonis viron, kiu pri nenio demandas, kaj malmulte miras; ĉar tiuj ecoj estos nemalhaveblaj ĉe tio, kiun vi ĉi tie vidos. Kio okazos estas ĝusta. Sed kiu ne malhelpus min, malinstigus min, provus malebligi ĉion? Tial mi longtempe serĉis sendemandan kaj sentiman viron; post tempo mi trovis vin. Kaj mi bezonas precipe viron inventeman, por ke li, farinte ĉion ĉi tie farotan, ne lasu la regantojn de ĉi tiu urbo malhelpi lin elpreni la skatolon ne malfermitan, kaj cetere efektiviĝi tion pri kio mi ankoraŭ petos vin."

Mi tremis, sed ankoraŭ demandis nenion. Mi do estos envolvita en la obskura entrepreno de fremdulo, kaj verŝajne la lasta efektiviganto de kio post horora ago fine restis. Mi estos

kunkrimulo pri io, kiu evidente estas kontraŭ la leĝoj de la lando, kie mi nun estas, eĉ se laŭleĝa en la hejmloko de la malkonatulo.

La fakto ke mi tiel seninterrompe silentis, estis tute laŭ la gusto de la maljunulo. La filino kontinuis post eta paŭzo denove en lia nomo: "Ho fremdulo! Mi estas maljuna kaj tre respektinda viro, la sola membro de mia popolo, kiu vojaĝis de nia insulo al alia, tiel malproksima kiel via, por kreskigi miajn grandajn trezorojn. Antaŭ ducent kvardek ses jaroj estis ĝenerala kutimo ĉe ni, vojaĝi al aliaj insuloj; sed tiam ekstaris super ni reganto, kiu fermis niajn havenojn, kaj ekde tiam neniu forvojaĝas, kaj neniu fremdulo rajtas albordiĝi ĉe ni, krom en du golfoj. Tamen mi, ravita de la deziro riĉiĝi, kaj sciante kiaj nemezureblaj trezoroj estas kolektitaj per negocado en la lando de la fremduloj, ekpraktikis niajn antaŭajn kutimojn, kaj mi veturis en la nebulo de la nokto for de la nordorienta kabo, kie mi mem regis sub la ĉefreganto de nia insulo; mi forveturis por viziti la mil insuletojn, ĉirkaŭe en la mondomaroj. Sur ili mi restis jen tie, jen ĉi tie, kaj gajnis multon. Fine mi venis ĉi tien, kaj ĉi tie mi loĝis dum sepcent tagoj. Mi havas pli grandajn trezorojn ol tiu, kiun oni nomas reĝo en via eta lando. Sed aŭdu, ho fremdulo! Mia propra reganto, hejme

sur mia insulo, koleris pro mia foriro, kontraŭa al la malpermeso de li kaj de liaj antaŭuloj. Finfine li spionis mian restadlokon, kaj per la kuriera servo de nederlanda ŝipo li sendis al mi sian ordonon morti. Feliĉe mi naskiĝis en tiel alta stato, ke mi havas la rajton mortigi min mem, kiam venas la verdikto de mia reganto, kaj mi ne devas fali sub ekzekutisto. Tiun mian rajton mi nun, klinigita al la suba rando de lia ĉi tien sendita letero, plenumos; kaj mi honorige trafranĉos min, kiel faris multaj el miaj prapatroj antaŭ mi, kiam la verdiktoj de iliaj regantoj venis al iliaj domoj sur flava silko. Kaj mortos ankaŭ miaj filinoj. Je verdikto, tia kiel ĉi tiu, la infanoj sekvas sian patron, honorplenaj kiel li; kaj ĉinokte ili kun mi plenumos la vortojn de Kubo. Sed vi, ho fremdulo, kiu ĉi tie estos atestanto de granda kaj sublima ago — vi, kiun mi trovis elektita, vi faros por ni tion, kiun volus fari neniu alia en ĉi tiu urbo (ĉar mi testis ilian sintenon, kaj trovis ke ili traktas fremdulojn laŭ iliaj propraj leĝoj); vi, post nia morto, silente kaj nevidite portos niajn kadavrojn suben en ĉambron, malhelan, kun ĉiuflanke muroj de blanka marmoro, sed sen fenestroj. Ĝi situas ĝuste sub la banĉambra akvo, kiun vi vidis, kiam vi iris ĉi tien. Tien kuŝiginte nin, kaj enmitinte la ŝtonon en la muron post ni, vi foriru, kaj diru nenion; kaj

neniu trovu la vojon tien, aŭ elprenu nin por entombigo, laŭ la kutimo de ĉi tiu insulo. Ĉar kiu mortis post verdikto de Kubo, kiel ni ĉi tie faros, tiu poste kuŝu tiel sub akvo, kiel mi diris al vi pri ni. Sed la grandan kandelabron vi, metonte nin en la tomboĉambro, unue faligu en la akvon, por ke ĝi estingiĝu kaj ĉiu lumo en ĉi tiu domo malaperu. Estingiĝinte, ĝi disvastiĝos incenson de aloo kaj bonodoron de kupreso, kiu estas kara al ni havi en la morto, kiam ni estas enmetotaj en la tombon; ĉar tia estas nia kutimo, kiun ni amas. Kaj tio sufiĉas. Sed fine vi pri la glavono kaj skatolo faru tiel, kiel mi antaŭe diris; kaj la glavono vi ne rajtas purigi, por ke Kubo, kiam la skatolo trans la kvincent maroj venos al li, vidu sur la klingo nian sangon kaj ĝoju pro nia obeo."

La interpretisto silentiĝis. Mi staris kiel statuo. (La kandelabro jam falis, mi pensis; ĝi do atendas nur la kadavrojn — mi tremis.)

La patro mansignis al la filino, kaj ŝi kontinuis: "Ho fremdulo! Perfekta vi estas! Kaj vi faros tiel, kiel mi diris. Sed se vi hezitos, vi ne fuĝos de ĉi tie. Se jes, vi menciis al la popolo de ĉi tiu insulo aferon kiun ili trovos kontraŭleĝa, kaj ili tuj enpenetras ĉi tien. Se vi hezitos, vi ĉi tie mortos, por ke vi ne eliru. Mi fortranĉos vian kapon. Mi bedaŭros tion, ĉar tiam mi devos denove serĉi aliulon por plenumi tion, kiun mi

bezonas; kaj kie mi trovos viron, similan al vi en sendemanda virto?"

La rigardon plenan je profunda sento kaj granda fido, kiun la maljunulo ĵetis al mi, kaj kiu akompanis lian anoncatan decidon pri mia kapo, frostigis min. Eŭropano ne povas kombini tiajn kontrastojn; precipe ne kun la trankvila digno de aziano. Sed tiom mi nun komprenis, ke plej grave estas provi savi kvar vivojn, inkluzive mian.

"Ho virinoj de Nifon!\*" — mi diris por trovi la melodion — "ĉinokte vi mortos; kaj honorige, laŭ la volo de la reganto, sekvos vian grandan patron. Sed vin ne tuŝos, male al lin, la blindiga, akra ŝtalo de Nifon, sed vi estos vivante entombigitaj en malproksima ĉambro, kiun mi en ĉi tiu domo elektos por vi. Tia estas mia volo."

\* La propra nomo de *Japanio*, kiun mi nun feliĉe ekmemoris, sinjoro Hugo. Kaj ke tiuj homoj venis de tie, pri tio mi post la jam rakontitaj okazintaĵoj ne trovis eblon dubi. Ankaŭ la privilegio de la japana *nobelaro* per malfermo de la abdomeno mem ĉesigi sian vivon, kiam venas mortokondamno, estas ĝenerale konata fakto.

Mi eldiris tion malrapide kaj solene, sufiĉe azieske por devigi la patron al respekto. Mi trovis ke, kvankam li ne sen malfacilaĵoj parolis akĉentitan anglan, la tamen komprenis la lingvon, kiam aliaj parolis ĝin. La filinoj, kiuj perfekte

komprenis min, ĵetis al mi rigardojn plenajn je timego; la pli aĝa el ili rigardis min tiel traborante, ke tio memorigis min pri miaj spertoj en la ĉaro: fine ŝi tamen palpebrumetis, kvazaŭ komprenante, ke en mia neatendite severa kaj terura verdikto estas kaŝita io de la inventemo, pro kiu mi ĉi tie plurfoje rikoltis laŭdon. Mi devis lasi ilin portempe pensi pri mi kion ajn ili volis.

Mia dignoplena konduto fakte estis la maniero ekhavi, kiel mi deziris, povon super la patro. La riĉa kaj majesta aziano tamen baldaŭ retrovis ekvilibron. "Miaj filinoj vivante entombigitaj? Ho ne. Ili estos, kiel virinoj de alta denaskeco, de mi tratanĉitaj kaj poste entombigitaj." — Tion li diris al mi, ja kun malfacileco pro la lingvo, sed tre decideme.

Tio ne okazos! mi respondis. Ho viro de Nifon! Viajn filinojn mi volas per propra mano entombigi vivantaj — se ne, mi ne post via morto faros tion pri kio vi petis min.

"Ho fremdulo! Se tiel estas, ke vi rifuzos plenumi mian volon, vi falos unue. Sed ne via mola talio estos, laŭ la leĝo de l' honoro, tratanĉita; anstataŭe via kapo estos forhakita, kiel ĉe la verdmakuleta *zinga*-lacerto. Poste miaj servistoj denove veturos surstrate, por serĉi novan viron por mi." (Kia azia zorgo, mi pensis.)

*Loinxi ejvó! Ejvé! Kubo, Kubésimo!* mi diris

laŭte, serioze kaj akre fiksrigardante lin. Mi ekmemoris, ke mi antaŭe aŭdis lin mem eldiri tiujn vortojn tre sindone, kaj tial mi esperis ke ili signifis ion. Mia ideo sukcesis. Preskaŭ tuj kiam ili atingis liajn orelojn, li faligis sin, kaj ses fojojn batis la plankon per la frunto, esprimante la plej profundan subigemon kaj sklavecan respekton.

Mi decidis ekuzi mian povon ĵus ricevitan. Dum li ankoraŭ genuis, mi iris rekte al la granda japana dokumento, kiu enhavis la ordonon de Kubo pri la morto de mia gastiganto; tute sentime mi prenis la silkoŝtofon, volvis ĝin, kaj metis ĝin en mian poŝon. La viro paliĝis je mia aŭdaxo, sed ne kuraĝis levi sin. Poste mi iris al lia nudigita glavo, kiu ankoraŭ kuŝis sur la kuseno en la angulo. Mi prenis ĝin, pensante ke mi rompos ĝin. Ĝi elaste fleksiĝis; sed la ŝtalo ne rompiĝis, certe ĝi estis plej altkvalita. Tiam la pli aĝa filino, nerimarkate de la patro, indikis ion al mi, kion mi interpretis tiel, ke mi rezignis pri al entrepreno; verŝajne ŝi volis komprenigi al mi, ke ŝia patro havas tiel multajn armilojn, ke detruante ĉi tiun, mi treege kolerigus lin, sed efektivigus nenion.

Mi permesus al mi aliajn kaj pli grandajn liberecojn, se mi estus informita pri la limoj de la povo de mia gastiganto en la domo, kaj pri la fakto kiujn personojn, krom la ĉeestantajn, li povus ordoni. Tamen mi kriis altavoĉe al la pli

aĝa fratino: "Venu, ho juna koturno! Vi kiu flugis ĉi tien el la glora insulo de Nifon, prenu vian fratinton je la mano, kaj sekvu min. Mi tuj gvidos vin al la loko, kie mi intencas por ĉiam enŝlosi la spiriton de viva vivo. Tia morto estas por plenumi la verdikton de Kubo al vi la plej konvena. Tia estas mia volo — venu!"

Sen heziti ŝi prenis la manon de sia pli juna fratino. Kia figuro? Tremante, sed kun neeldirebla rigardo tiu sekvis, kaj iris — tiel ŝi kredis — al horora morto. Kiam ni proksimiĝis al la pordo, la maljunulo ankoraŭ genuis; sed li ĵetis rigardojn mezurante min, foje kvazaŭ li volus vori min, foje kvazau li interne iĝus polvo. Rapide li ekstaris kaj venis post ni. Tiam mi levis mian manon kontraŭ li minace, kaj kriis: *Loixi! Loixi!* per voĉo, kiu eĥis tra la ĉambroj. Li svenis kaj falis planken. Mi eliris kun liaj filinoj. Forigi ilin de lia murdema mano mi trovis plej urĝe.

"Neniu bone lakita manventumilo similas al vi, ho bela perlportantino el Nifon!" mi flustris al mia kutima konversaciantino, la pli aĝa fratino; "diru al mi, kie estas via propra ĉambro? Konduku nin tuj tien!" — Ŝi kapkonsentis.

Ŝi gvidis nin tra pluraj ĉambroj. Ni venis al tute alia parto de la granda palaco, ol tiu tra kiu mi iris unue enirante, kaj fine ni atingis ĉambron,



tiel belan, sed tiel senmeblan, kiel nur imageble. Tiu popolo certe amas nek litojn, nek seĝojn, nek tablojn. Aliflanke, ankaŭ ĉi tie videblis longa kuseno, kovrita per la plej fajna silko, laŭ la muroj ĉirkaŭ la ĉambro, alta je duona ulno super la planko, kaj servanta samtempe kiel seĝo, sofo kaj tablo. Restu ĉi tie! mi diris.

*"Glamorínez carànxí ojníma bè!"* eldiris per lamenta, ĉiela voĉo la pli juna fratino, kaj ĉirkaŭprenis mian manon. Tiel vivantan bildon, miksaĵon de pia sindonemo, dektrijara beleco, kaj angoro aldone, neniuj pli vidos en ĉi tiu mondo. Ŝiajn vortojn mi ne povas traduki. Kaj tamen ŝajnis al mi, ke mi komprenis ilin ĉiujn. Eble ŝi kredis, ke ĉi tie ŝi finos sian vivon per mia mano? Ŝi ĝojis ĉar ŝi dume tamen estas en propra ĉambro, kaj eble ŝi ankoraŭ havis espereton pri kompatemo en mia karaktero. Ĉu ŝi supozis ke mi komprenas ŝian patrolingvon, ĉar mi, sufiĉe impertinente, permesis al mi laŭ feliĉa hazardo uzi kelkajn ĝiajn vortojn?

Vidante tiun esprimkapablan kapon, kaj aŭdante tian voĉon, ne eblis al mi rigardi ŝin *sovaĝulino*, aŭ rifuzi al tiu gracila transmarulino lokon en la altaj rondoj de la ĝusta klero. La animo ne donas al si tiun esprimon sen esti pure kaj vere homa. Kion tiu knabino krome konis en la mondo, mi ne scias. Mi ĉirkaŭrigardis en la

ĉambro, kaj trovis multajn nefinitajn virinajn taskojn kuŝantajn tie kaj ĉi tie sur la kuseno; sed pri ili mi ne povis juĝi. Ŝi ankoraŭ tenis mian manon kaj rigardis min. Ĉu ŝi atendadas respondon de la fremdulo, de la nekonatulo? Al la lasta insulo de la okcidento ŝi do venis, por antaŭ la morto petante ĉirkaŭpreni tiun manon? Mi foriris al skatoleto, kiun mi vidis plena je juveloj; mi plenigis mian manon per ili, kaj malfermis ĝin rekte super ŝia kapo, pluvigante ilin sur ŝian tutan figuron. Mi antaŭe aŭdis pri tio kiel orienta kutimo, kiam oni montras al princinoj la plej altan reĝan honoron. Tuj kiam mi faris tion, ŝi falis surplanken, kovrita de la juveloj. — "Ho fremdulo! Do vi vere konsekras mian fratinton al la morto?" elkriis la plej aĝa. Mi ektimis; mi komprenis, ke la azia kutimo, kiun mi aŭdacis praktiki, havas duoblan signifon.

"Ne," mi respondis, "tion mi ne faris. Sed vi starigu ŝin, kaj kisu ŝin reen al la vivo. Tia estas mia volo."

La planon, kiel liberigi tiujn homojn el la fanatikeco de ilia patro, mi ne povis esti jam finfarinta. Tamen mi diris al la pli aĝa el la fratinoj, ke mi deziras, ke ili restu ĉi tie en la ĉambro, ŝlosu la pordon el interne, kaj ne malfermu ĝin por iu ajn, kiu ne faros certan signon. Ŝi komprenis min; mi iris.

Mi malproksimigis min por serĉi la patron. Ĉu mi sukcesos fleksi lin? Dumvoje mi kontemplan la orientan sintenon de tiu viro. Mi ekmemoris kiujn priskribojn mi aŭdis pri la loĝantoj de la plej ekstrema el la orientaj insuloj, kies popolo laŭdire estas la plej kavalireca en Azio. Mi memorigis al mi el la verkaro de Abel-Rémusat multon pri ĝia lingvo, kiun mi eble laŭsone, sed tamen ne laŭvorte, trovis konforma al tio, kiun mi aŭdis ĉivespere; eblas tamen, ke miaj personoj ĉix tie parolis pli foran, nordan japanan dialekton, kiun Rémusat ne konis. Mi ankaŭ rememoris tion, kiun mi aŭdis pri la kontraŭnatura, malprofita kaj kruela despotismo de Kubo, pri lia senlima potenco super la vivo de siaj subuloj, kaj pri la sinofero de la altranguloj, tuj kiam ili ekscias pri la verdikto de la reganto — ofero kiu inkluzivas ne nur ilin, sed ankaŭ iliajn parencojn. Ja ankaŭ paŝaoj mortas propravole, kiam la sultano sendas al ili la silkan ŝnuron? Kun variaĵoj estas tiel sur la tuta tero: tiel ne nur pri la *ĉeso* de la vivo, sed ankaŭ pri ĝia *humiligo*, dum ĝi ankoraŭ daŭras. Mirinda sinteno, en kiu la homaro falis, ke unu persono opinias nepre aŭ necese stari sub alia tiel, kiel neniu nepre aŭ necese devus stari, krom sub la plej alta estaĵo. Jen se ne nia unua, tamen nia dua pekofalo. Ĉar kiam la homo falis for de Dio, li

falis poste sub sia kunhomo. Tiun azian mensmalsanon ja precipe la kristanismo kontraŭbatalas, ĉar ĝia ĉefa celo estas meti la homon denove sub la potenco de Dio, liberigante lin el ĉiuj homaj leĝoj, en *unua* loko, pri kiuj ŝi zorgu nur *se* ili ne estas kontraŭ la ordo de Dio, sed ne aliokaze (kio fakte signifas, ke *esence* ne pri ili li iam ajn zorgas, sed nur pri Dio). Tiu azia malsano, tamen, kiom ĝi ne ankoraŭ restas en nia Eŭropo mem? Restas, ĉar ni estas aziaj kolonioj, kaj la kristanismo inter ni ankoraŭ efikas malmulte. Tiu mizero, kiam miloj ekmarŝis por detru, detruigi, kaj ruinigi al si reciproke la hejmlokojn, ne por la progreso de la bono, la vero kaj la belo en la mondo, sed por apogi kelkajn grandajn unuopulojn en iliaj familiaj konfliktoj, por efektivi iliajn intrigojn, ilian venĝon, ilian deziron pri mono kaj landoj — ĉio tio, kiun mi, por havi nomon pri ĝi, volas nomi la *falsan kavalirecon*, ĉu ĝi ne trairas la pasintajn jarmilojn de Eŭropo, ĝis tre proksime al ni? Kaj kio ĝi estas, se ne azia infekto, kontraŭ kio la vortoj kaj evangelio de la Filo ĝis nun ne povis multon fari? Ke la homoj mortas, tio ne tre gravas: kiam ili mortas pro la homaro, tiam estas afero granda kaj glora, estas la plej dolĉa destino de la mortemuloj: sed kiam ilin la rabio de falsa honoro kaj erara fidelo logas detru sin mem kaj aliajn pro la

kapricoj de iuj potencaj unuopuloj, nomitaj leĝoj, por iliaj arbitroj, intrigoj, profito, kaj — kiel ofte okazis — por la progreso mem de la fia, de la kruela, de la vere malnobla — kio estas tio? Estas Azio, kiu narkote, anesteze konfuzigas, kaj kun siaj institucioj ankoraŭ sekrete premadas Eŭropon.

Sed estas ankaŭ kontraŭ tiu en nia mondoparto deliranta azia febro, kune kun mil aliaj al tiu parencaj mensmalsanoj, ke fine en niaj tempoj la okcidentaj reformantoj ribelis (unue Luther, kaj poste, pli malfrue, ĉiam pli da ili), aŭ, kio estas la sama afero, la kristana spirito kaj deziro al bonfarto aperis, por sanigi la malican kaj koleran. Dio donos venkon, kaj la mizeraĵo iĝos polvo.

Mi jam haste iris tra la pordojn de la palaco, kaj kvankam estis temporaba afero nun rakonti pri tiuj pensoj, ili sufiĉe rapide trairis mian animon. Mi trovis la politikon de Kubo, devigi siajn subulojn resti en Japanio, eble pli severa, sed esence tute ne pli absurda, ol tiom da eŭropaj malpermesoj. Tre kortuŝa mi trovis la bildon de la malfeliĉa fanatikulo, la subulo; ne ĉar mi ŝatis lian sintenon, sed ĉar min interesas ĉio en la kadro de vivo kaj morto; kaj la erarojn mi rigardas tenere, ne kiel la saĝa kuracisto aŭ instruisto, ĉar li kapablas sanigi, kaj mi ne — sed

mi rigardas ilin kiel la kunfrato, kiu havas okulojn kun larmoj. Kia miriga konkono ne foje estas la homa animo? Tiu viro de Nifon malestimis la baron de la lando, kaj li ne zorgis pri la malpermeso de elmigro; sed malgraŭ tio la konvinko pri la rajto de Kubo al lia vivo tiel radikis en li, ke se nur trans kvincent maroj (kiel li diris) estis sendita al li ordono morti, tiam li neniom tion pridemandis. Mi notis, ke lian mensmalsano precipe nutris la mortiga veneno de la falsa honoro: kaj la fierecon de tiu orienta moŝto (ĉu nobela, ĉu komerca — tutegale) pri sia prerogativo, sin tratanĉi, mi ja trovis iom pli *hervorragend* — *criante* — aŭ "tranĉa" (vi mem elektu kiu lingvo plaĉas al vi, sinjoro Hugo) sed esence same, kiel la cent mizerajoj, pri kiuj fieriĉas la privilegiitoj de Eŭropo, kaj por provi ĝui ili riskas la plej belaj kaj teneraj partoj de la vivo. Plej konkeca ŝajnis al mi la karaktero de la filinoj. Sendube, ilia sekrete indikita peto al mi esprimis deziron esti savotaj el la mano de la murdisto. Sed se ili sole nur, aŭ — kiel oni diras — "tutsimple" volus esti savataj, tiam ili ja povus sen malfacilaĵoj fuĝi el la domo de la patro? Sed tion ili ne faris; kaj kial? Ili estis la infanoj de la maljunulo: ili estis virinoj el la unua insulo de la orienta maro: kia nun estis ilia deziro? Kion ili volis? Mi kredas, ke ili, instigitaj de homa sento,

volis esti savotaj; kaj ke ili tamen, por sekvi la patron, ne volis. Kion mi faros kun ili? Ho, se mi nur povus fleksi la volon de la patro! Kiu, se ne la kreinto mem de la homa koro, povas malnodi la nerompeblan silkan maŝaron de tiu koro?

Dum tiel konfliktaj eblecoj kaj pensoj mi kuradis tra la etaĝoj, kaj fine atingis la pordon de la ĉambro de la maljunulo, kie mi aŭdis profundajn suspirojn. Suspiroj sonas same en ĉiuj lingvoj; mi do povis kompreni lin. Mi rapide malfermis la pordon — kaj kiel terura vidaĵo!

La maljunulo sidis en la angulo sur sia longa, kunfranĝa, flava kuseno, banata de sango; kaj la glavo ankoraŭ en lia mano. La kapo kuŝis senfortigita, klinante sin al la ŝultro; sed li ne estis morta. Li ankoraŭ havis plenan konscion, kaj la fino de la tera vivo per tiu mortomaniero ne povas esti tuja. Per rompita voĉo li diris:

Ĉu miaj filinoj estas jam entombigitaj, ho fremdulo? Kial vi forigis ilin el mia rigardo? Ho se mi ankoraŭ estus en mia lando! Tiam mi ne ĝuus mian lastan momenton tiel mizera kaj sola. Cent kunvenintaj amikoj ĉirkaŭ mi atestus mian obeon, fidelon kaj heroecon. Filinoj miaj! Kie vi estas? Via patro prisuspiras vin!

"Patro, ili vivas!" mi interrompis, "kaj ili vivos."

Timigaj vortoj! Kaj mi ne vidos ilin?

"Maljunulo de Nifon! Vi estas mortige, senhelpe vindita; tion mi vidas. Viaj filinoj venos, por aŭdi vian adiaŭon kaj dolĉigi la forpason de la melfeliĉulo."

Li kapkonsentis kun malhela rigardo, kiu tamen rapide senvualiĝis.

Mi serĉis sonorilon, por voki iun el la lakeoj helpi lin. Vane! Mi kriis. Neniu respondo. Sendube ili estis intence malproksimen forigitaj.

Mi kuregis reen al la ĉambro, kie mi lasis la infanojn de la komerca princo; faris la signon; la pordo malfermiĝis. Sen malŝpari eĉ unu vorton por klarigi, mi prenis ilin, po unu en ĉiu mano, rapidis reen, kaj ili kun mi. Mi nun ne plu devis timi, ke la mortanta viro povus iel atenci iliajn vivojn. Mi savis almenaŭ ilin.

Ni nun staris ĉiuj tri en la ĉambro de la maljunulo.

Lia unua rigardo al ili estis milda kaj beata kiel nature estas kiam patro vidas siajn infanojn. Baldaŭ poste, li malheliĝis: "Vi vivas, ho mizeraj?" (li diris en la loka lingvo, verŝajne ĉar li ĉefe al mi direktis la riproĉon). "Ĉi tiu fremdulo do delogis vin ne morti — sed vivi, kaj forgesi la honoron de Nifon!" — Li ĵetis, alterne al mi kaj al ili, la rigardon de tigro. Ne plu estis la rigardo de la patro kaj homo: estis tiu de la moŝto.



La filinoj ĵetis sin al lia duone kuŝanta figuro. Apenaŭ perceptante iliajn zorgojn li, mobilizante ĉiun sian restantan forton, levis la kapon, kun terura mieno rigardis iliajn tenerecesprimojn kaj diris: Mi kredas ke vi deziras, ke mi vivu? *Loixi!* li elkriis, spasme ekprenis la glavtenilon, kaj estis tuj pikonta per la armilo la bruston de sia plej juna, verŝajne plej amata filino, kiam mi, kiu atentis ĉiujn liajn movojn, per rapida interveno tiris la glavon el lia mano, kaj metis ĝin longe for de li.

Neniu vorto povas esprimi la agresemon kaj palan rabion, per kiuj li rigardis min, kiam mi forprenis de li la amatan rabaxjon, kiun li tiel volonte prenis kun si. Ambaŭ liaj filinoj genuis antaŭ li, kvazaŭ preĝantaj diservistinoj antaŭ iu Ŝivao.

La maljunulo fermis siajn okulojn, kaj lia kapo falis ĉiam pli. Li etendis sian manon sub la veston supren ĝis la koro, kaj ankaŭ klinis sian buŝon sub la larĝajn vestlangojn, ĝis ne multe pli ol lia frunto videblis supre. "Lia momento proksimiĝas," mi diris, kaj ambaŭ knabinoj komencis kanti sian ĉielan himnon al Sinto:

*Cariaconda*  
*Sinto, mi Sinto!*  
*à cama bè*

*àcamahonda la*  
*Sinto schè.*

Nun la mortanto denove forigis la bordojn kaj faldojn de sia vesto el antaŭ sia vizaĝo, malfermis la okulojn, kaj rigardis siajn infanojn kun la plej milda, dolĉa brilo, kvazaŭ aliformita. "*Glamorínez,*" li flustris. La knabinoj subenfalis al liaj manoj kaj kisis ilin, preskaŭ preĝante. Sed li indikis, ke li volas kisi ilin surbuŝe. Unue la pli juna, kaj poste la pli aĝa, proksimiĝis al lia kapo, kiun li kun fortostreĉo ankoraŭ levis. Kun brulantaj rigardoj li kisis ĉiun el ili. Li ŝajnis ĝui kvazaŭĉiele, premante sian mortantan buŝon longe — longe — tiel longe kiel li povis, al iliaj vivantaj lipoj. La adiaŭo nun estis farita. Lia kapo falis malantaŭen; li mortis. Do la patra amo tamen fine venkis! mi flustris al mi mem.

Mi staris sur la planko interplektante la manojn. "Lian glavon mi metos en la lakitan skatolon, kaj Kubo sur sia fora insulo ricevos la pruvon pri la lasta ago de lia subulo — Dio estas kompatema."

Mi staris rigardante ambaŭ senpatrulinojn. La pli aĝa el ili levis sin, prenis la manon de sia bela fratino, kaj venis al mi. Iliaj haŭtoj nun estis tiel travideblaj, kiel la plej hela, plej pala kadro. Ekstaza, sed malforta lumo brilis en iliaj okuloj.

La pli aĝa, kiu ĉiam estis tiu kiu parolis, diris:

"Nia patro kisis nin, fremdulo, kio okazos al ni?"

Tiu demando surprizis, kaj preskaŭ vundis min. Kun la nemezurebla riĉo, kiun mi sciis ke ili posedas, la vivo estos por ili facila, kiam temas pri eksteraĵoj, kaj temante pri la interna flanko, mi esperis ke la kristanismo frue aŭ malfrue konsolos ilin. Mi intencis proponi al ili, ke ili por iom da tempo ekloĝu ĉe Abbey S:t Maurice. Sed tiel frue aŭdi tian demandon, tio dolorigis min. Tiel rapide do patro estas forgesita pro vivzorgado? Mi rigardis ĉirkaŭe, kaj havis malfacilaĵon respondi. Tiam ŝi iris kun sia fratino ĉemane eĉ pli proksimen al mi kaj ripetis:

"Nia patro kisis nin! Ne rigardu ĉirkaŭe. Ĉiuj estas jam pagitaj pro siaj servoj, ricevis ordonon foriri, kaj iris. Ne rigardu ĉirkaŭe; vidu nur nin."

Mi surpriziĝis.

"Vi plenumos al ni ĉion kion nia patro petis vin fari. Vi entombigos nin."

Vi estas junaj, pli junaj ol mi; iu alia entombigos vin.

"Ho fremdulo, vi ne konas la viron, kiu venis al ĉi tiu insulo. Mi, lia filino, povis heziti; kaj mi konfesas, ke mi dum la tago de kvar sunoj volis povi eviti la morton. Mi esperis, kiam mi trovis vin, ke mi tra via kuraĝo kaj inventemo ricevos

kion mi nomis helpo, alia ol tiu kiun mia patro deziris de vi. Sed viro de alta familio nun kisis siajn filinojn; kaj la kison de la fino ili ricevis. Mi pentas, ke mi deziris helpon de vi, aŭ de iu ajn. Vi estu veninta nur por fari tion, pri kio nia patro petis vin. Ni memoras, ke ni havas parencon kiel li, Kubon kiel li, kaj Finon de li, kiu donis al ni la Komencon. Grande estas fali kiam la reganto tion volas!"

Konsternite mi rigardis la du figurojn antaŭ mi: ŝajnis al mi, ke sveno volis volvi sian vualon sur iliaj tempioj. Mi mirigite ĉirkaŭrigardis en la ĉambro por trovi...

"Ne serĉu kuracilojn!" ŝi diris per mallaŭta voĉo. "Nia patro portis ĉe sia koro la folion de iu arbusto. Kontraŭ la suko de tiu folio ekzistas neni malveneno, neni. Ĉi vi vidis la afliktitan maljunulon, kiam li klinis la kapon sub sian tafton? Tiam li maĉis la folion kaj prenis ĝian sukon sur siajn lipojn. Ĉu vi vidis la amantan patron, kiam li levis la kapon el sub sia tafto? Tiam li kisis siajn filinojn per tiuj lipoj. Ni mortos. Tiel faras viro de honoro, la filo de sia reganto, de Nifon: kaj tiel faras liaj filinoj."

Ŝi brakumis sian pli junan, belan fratino, iliaj kapon falis kunen. Ili sinkis al la planko. — La pli juna fratino serĉis per sia buŝo la koron de la alia. *Glamorínez ojnima bè* — tiel mi aŭdis

lantan tonon estingiĝante flustri — la alia respondis nenion —

Mortaj!

Kaptita de ... mi kuregis el tiuj dezertaj, teruraj ĉambroj. Marmoro, silko kaj juveloj ĉie renkontis miajn paŝojn.

Veninte suben en vestiblojn kaj pordovolbojn mi sentis min ĉirkaŭata deodoro, simila al la forta incenso, kiu antaŭe en la ĉaro svenigis min: estis fumo, kvazaŭ el ambro, mirho, aloo kaj la plej aromaj oleoj. Mi rapide eliris.

Veninte al la strato, mi kuraĝis ankoraŭ kun tremo ĵeti rigardon supren al la alta palaco malantaŭ mi. Ĝi staris malhela, prema kaj timiga super mi, tiel kiel Azio kuŝas sur Eŭropo. Mi fuĝis.

Estis noktomezo. Ĉiuj stratetoj, placoj, domoj kaj preĝejoj de la urbo ŝajnis nigraj. Rapide min ekskuis la sono de alarmtamburo. Fajro! Fajro! oni kriis post mi. Mi turnis min. Kion mi vidis? La palaco, kiun mi vizitis, brile brulas. Kiu estis la fajrokaŭzanto? Mi efemere memoris la falintan kandelabron, el kies miloj da lampetoj multaj disflugis al la muroj kun enmetaĵoj de facile flamigeblaj lignospecoj. Ĉu eblas? mi pensis. Mi — mi do —

Do ili tamen ricevis tombon! Brulŝtiparon!  
Kaj ... pro mi!

La urbo mem estis savita danke al siaj bonaj fajrestingiloj. Sed la Palaco iĝis cindro.